



Dumonata esprimilo eldonata de **Amika Esperanto-Rondo**  
 Redaktejo : Esperanto, FR 47470 BEAUVILLE  
 Abono en Eŭropo : 60 FF. Ekstereŭrope : 80 FF  
 Donacabono por nepagipovaj amikoj : 40 FF  
 Ĝiri al : CERCLE AMICAL ESPERANTISTE  
 Pĉk : 3371 74 M Bordeaux (mencii same sur bankĉekoj!)

## UNIVERSALA

### AU INTERNACIA LINGVO ?

Estas en la movado homoj, kiuj propagandas por tutmonda unuiĝo kaj fina malapero de ĉiuj lingvoj profite al unusola UNIVERSALA LINGVO ; politike, ili esperas al la fina naci-solviĝo en UNO-n kaj al monda regado. Ili kritikas la naciajn kaj gentajn faktojn kaj volas ilin forviŝi, ĉar, laŭ ili, tiuj kaŭzas militojn, kiel en eksa Jugoslavio ; tiel ili provtiras la E-movadon al sia konvinko. Tio estas homogena, logike konsekvenca.

Sed en la movado estas ankaŭ aliaj, kiuj tute kontraŭe pensas, ke nacio estas grava elemento de libereco aŭ de libereco-sento : kiam popoloj havas samajn aŭ miliajn kutimojn, morojn, kredojn kaj kondutojn, ili sentas sin liberaj en naci-spaco, kie regas tiuj samaj kutimoj, moroj, kredoj kaj kondutoj. En tiu senco, nacio estas aŭ devus esti federacio de familioj, kaj tiuj familioj sentas sin en tiu nacio kiel interne de fortikaĵo. Por ili, la regado devas esti nacia, kun

eventualaj inter-naciaj kontraktoj ne nepre ŝtataj, kiel Airbus, Intelstat, Ariane ktp. Mondlokaj unuigoj eblas sub formo de konfederacioj, t.e. unuigo de nacioj por komuna profitdona celo. La naciajn lingvojn, la provincajn lingvojn oni rigardas kultur-trezoroj, kiujn oni zorge flegu kaj konservu. Esperanto estas la ideala rimedo por rilati kun la ekstera mondo aŭ interne de konfederacio : ĝi restas kiel ĝin difinis ĝia kreinto Zamenhof "la Internacia Lingvo" (I.L.O.), do internacia ! Ĝi ne ekputrigas la gentajn lingvojn, ĉar baziĝas nur sur logikeco, kiu estas esence neutrala.

La artikoloj de la unuaj opiniantoj eble ŝokas tiujn lastajn : ĉu ni estas tiom multnombraj, ke ni devos nin dividi laŭ tiuj politikaj opinioj, eĉ kun la plej puraj intencoj ? Oni tamen ne povas nei, ke nacioj ekzistas, kaj kelkaj jam de tre longe, kaj ke, feliĉe, interne de okcidenta Eŭropo ili atingis almenaŭ bonan staton de stabileco kaj de najbarŝateco ; ili estas nun naturaj faktoj, kaj estas ĉiam danĝere malstabiligi ilin. Plej ĵusa ekzemplo estas la Versajla kontrakto de 1918a, kiu detruis stabilan ordon meze de Eŭropo : la imperion aŭstro-hungaran, kaj konstruis artefarite "Jugoslavion" strikte kuntenitan post la dua mondmilito per komunisma reĝimo (post jama diserigo dum la dua mondmilito) : tiu nacio diseksplodis kaj tie regas senpardona milito, sed ĉi-foje ŝajnas, ke la kaŭzo ĉefa ne estas nacieca, sed religia, ne lingva, ĉar ĉiuj parolas la serbo-kroatan lingvon tie. La islamana bosnia religio ŝajne malfacile kunestas kun la katolika kroata kaj la serba ortodoksa. Plie, en Sudano, la centralisma islamana registaro de la nordo premmilitas kontraŭ la sudajn katolikojn kaj animistojn. Aliloke estas rasaj militoj kaj masakroj, kiel inter Xhosaoj kaj Zuluoj, aŭ inter Tutsioj kaj Hutuoj...

Ni do flegu tiun pacan oazon "Okcidenta Eŭropo" !

Sed tio malproksimigas nin de nia ĉeftemo : kiu el la du sintenoj povos esti la pli profitdona por Esperanto ?

Ni supozu, ke la mondaj deziroj de kelkaj realiĝos : ĝi estos la ag-rezulto ĉefe de Usono, kiu kuntrenas sian jam tre disvastigitan lingvon (aviado, sportoj, speciale pri teniso - ĉu normale, ke en Francando oni intervjuas Boris Becker aŭ Stefi Graf pere de la angla, dum certe inter la organizantoj estas kelkaj, kiuj parolas la germanan kaj povus traduki al la franca...? Ĉu ne estus almenaŭ pli ĝentile?). Oni scias,

ke la angla komence estas alloga, ĉar ĝi ŝajnas (false) facila pro kvazaŭ manko de gramatiko ; due, ĝiaj insidaj idiotismoj instigas al hejmlingva malsaniĝo, difektado, fagocitado, kaj povas finiĝi nur per morto de la etna lingvo, kiel la "gaela" en Skotlando kaj Irlando. Sed, se la tuta mondo parolus la anglan, tio tute ne plu gravus (krom por la hejmaj lingvoj kaj naciaj kulturoj), ĉar la "kanoneco" (laŭreguleco) de la lingvo ne plu estos difinita en Londono, nek en Dalaso, sed eble en Pekino aŭ Novdelio (pro multloĝateco), kaj la Mondo, por sin kompreni, parolos anglecan oficialan piĝinan ĵargonon : la triumfo de la anglofonoj kuntrenos la pereon de ties lingvo, kio efektive tre timigas la anglojn mem. Krome, ili perdis ĉiujn siajn diskutavantagojn.

Esperanto per sia uzado ne difektas la aliajn lingvojn : ĝi konservas ilin puraj, kaj tio estas grava, ĉefa argumento, por ke Esperanto fariĝu la "INTERNACIA LINGVO" !

J. MANCEAU.

## VIVO DE "LAŬTE!" Eble ne tre lukse, sed almenaŭ PLU...

Al la demando "Solvo aŭ dissolvo?" de septembro nur tre malmultaj respondis :

- du amikoj pretus kontribui por aĉeti novan presilon ;
- lu sugestas alvoki en Laŭte por simila solvo ;
- amiko MININ el Tomsk (Siberio) pretus presi L! tre malmulte koste ;
- alia resumas, ke nur mi (la ĝisnuna presanto) povas solvi la problemon.

Nu, se ne estus monto da malfacilaĵoj kaj neniu garantio pri baldaŭa "normaliĝo", t.e. stabiliĝo de la situacio en Rusio, mi volonte transdonus la tutan aferon al la siberiaj amikoj, kiuj fakte jam eldonas bultenon "Aktuale eŭro-azie", kies formulo tre parencas al tiu de Laŭte. Bedaŭrinde, la presrimedo estas tie eĉ pli malbona ol tiu staranta en Beauville.

Aĉeti novan presilon, dum la nuna tiom multekostis antaŭ nur 4 jaroj ? Mi estas tro avara por tiel malŝpari la monon ŝparitan en 16 jaroj da Laŭte...

Mi do unuapaŝe esploris surloke kion tiri el la nuna presilo. Ĉar estus tro malfacile venigi surloken fakulon de firmao "Rex-Rotary" (la marko de la presilo) por reviziado, ĉar butikoj de Rex-Rotary malaperis el mia regiono, mi min turnis al firmao RICOH-MITA, reprezentita en AGEN, kaj kiu havas klientojn uzantajn presilojn similajn al tiu de Laŭte. Post reviziado,

purigado, anstataŭigo de la stencilvolvaĵo per alispeca tralasanta malpli da inko, konsekvenca reguligo de la gravurvarmeco, jen la artifikaĵoj por plibonigo, kiun mi esperas por tiu ĉi jarfina numero.

Do, tiel **Laŭte!** daŭras plu, eĉ se ne multe pli lukse...

Restas ekzamenenda la propono de amiko MININ. Eble tie, en Siberio, kuras solvo por disponigi **Laŭte** en orienta Eŭropo kaj Eŭro-Azio, per la tiea presado kaj dissendado de **dua Laŭte**. Tiel la mono tie kolektita estus uzata surloke kaj la "administrado" de la tiea abonantaro entute dependus de la tiea "centro". La redakta materialo "okcidenta" aperus en oriento kaj reciproke. Ĉu ne pluginda tiu vojo ?

\*

La sendado de **Laŭte** al nepagipovaj landoj dependas preskaŭ ekskluzive de la helpo de pagipovaj "Laŭtuloj". (Nur la peranto en Pollando povis kompensi sialandajn abonojn per sendado de E-libroj). Tial estis kreita la speciala donac-abono je 40 FF por sendigi la gazeton al amikoj loĝantaj en Nepagipovujo. Necesas kaj adresoj kaj mono. De vi, abonantoj (ne nepre la samaj) venu la adresoj kaj la mono. Eble vi povas disponigi monon, sed ne havas adresojn. Aŭ, male, vi ŝatus helpi amikon vian, sed ne havas monon. Sendu kion kaj kiom vi povas, mi klopodos aranĝi la aferon, por ke **Laŭte** estu kion eble plej multe legata en Nepagipovujo.

Al ĉiuj, dankas

Kristiano.

\*\*\*\*\*

# Riveroj

La dua numero de "Riveroj" (novembro 1993) aperis. De nun la abono al tiu bonega gazeto fontanta en Japanio (vd. **Laŭte** 107, lastpaĝe) kostas nur 2400 enojn = 80 FF.

La sidejo de **Laŭte**, F 47470 Beauville, volonte peras por "Riveroj". Profitu de la oportuno, kiam vi reabonos por **Laŭte** !

Ni peras ankaŭ por la gazeto de niaj siberiaj amikoj : "Aktuale Eŭro-Azio" Ties abono kostas 40 FF.

\*\*\*\*\*

**Noto de la red.** : En la januara numeron de **Laŭte!** estos enŝovita, donace, la reeldonita pamfleto de Paul LAFARGUE **La rajto de pigro** - iam aperinta en la broŝura serio. Kompreneble, la tiamaj broŝurabonantoj jam konas tiun tekston. La aliaj espereble malkovros ĝin kun intereso.

## ROMPADO DE KAPO VIRŜAFA

La periodon Aprilo-Julio la klubo ESPERO de ANYRON-KOPE (Togolando) utiligis por intensaj E-aktivecoj. La klubanoj profitis la ĝeneralan strikon de la lando por reorganizi la E-grupon. Okazis kurso por komencantoj/progresantoj, revizio de la kluba statuto, kaj festego. Tri tagojn montris la programo de la festo. Tamen aldoniĝis unu, kiun tiumedie oni nomas "Tago de rompado de kapo virŝafa". Kio estas "Rompado de kapo virŝafa", kaj kiel ESPERO-anoj okazigis ĝin ? Tiu ĉi artikolo celas informi pri tio.

Laŭ la kutimoj en tiu vilaĝo, festo koncernas ĉefe oferon al Voduo (diaĵo, eĉ dio). Plejofte tia festo daŭras unu tagon, kaj la oferata besto estas virŝafo. La sekvan tagon utiligas nur la altranguloj de la voduo por manĝi la virŝafan kapon, kiun neniu rajtas tuŝi dum la tago mem de la ofero. Jen do funkcias en tiu regiono "Tago de rompado de kapo virŝafa", kiu tago ĉiam sekvas ĉiun festotagon. Eĉ se la buĉita besto estas ne virŝafo, oni ĉiam parolas pri rompado de kapo virŝafa. Kiel do la anoj de la klubo ESPERO celebris tiun tagon ?

La festo en la klubo ESPERO okazis la 4an, 10an kaj 11an de julio 1993. La posttagmezo de la 11a de julio gastigis matĉon piedpilkan : ESPERO ludis kontraŭ teamo de najbara vilaĝo. Fine de la matĉo aŭdiĝis : "Ĉis morgaŭ!". Tiu diro venanta el buntaj buŝoj iel ŝokis min, ĉar la 11a de julio, laŭ la programo de la festo, estus la lasta tago de la festo. Oni klarigis al mi, ke okazos tiam la financa raporto pri la festo, kaj poste "Rompado de kapo virŝafa".

Lunde, la 12an de julio, je la tria horo, preskaŭ ĉiuj anoj de la klubo estis en la festejo, la katolika lernejo, la ununura elementa lernejo de la vilaĝo. Minutoj pasis. La ĉambro, kie okazis la festo la antaŭan tagon, pli kaj pli akceptis homojn. Tamen ĝis tiam neniu parolis pri la financa raporto. Nur ĵusveninta senharulo, jam ebrieta, pri kiu estas rakontote poste, insiste petis pri la kapo, la lasta manĝaĵo de la festo. Iom post iom la grupo de ESPERO-anoj en la festoĉambro dupartiĝis : la membroj de la komisionoj organizaj de la festo iris en alian klasĉambron, dum la aliaj klubanoj atendis. El la festoĉambro oni povis aŭdi kelkajn klubanojn grumblantajn/gruntantajn pro la ne-veno de la

mangajo. La senharulo, junulo kun tridek kaj kelkaj jaroj, tiutempe profitis la malvarmeton de la aero por dormi ronkante. Dume, en la alia ĉambro okazis vera laboro : la komisionoj organizaj de la festo montris la elspezojn pri la festo. Ĉio iris glate, ĉar la kalkuloj estis korektaj. Kelkajn minutojn antaŭ la fino de la bilanco financa fraŭlinoj eliris el la ĉambro. Tiam ankaŭ mi estis en la ĉambro kiel observanto. Mi tuj levigis por rigardi trans la murojn ; jen la fraŭlinoj revenantaj kun aliaj kunportantaj uĝegojn al nia ĉambro. Krioj eliris el la alia ĉambro : Ha ! Ha ! Ha ! La senharulo ridegis. Laŭ diroj de ESPERO-anoj, kvankam en profunda dormo, la senharulo tamen vidis la ujon da mangajo kaj ekkriis. Kaj la aliaj sekvis poste. Tiutempe en la ĉambro, kie okazis la financa raporto, la nova prezidanto jam malsekigis sian lipharon : kiom multe li povis salivi, nur vidante la ujon da mangajo ! Ne nur lin kaptis tiu emo mangi, sed ĉiujn. Mallaita alvoko venigis ĉiujn en la ĉambro, kie estis la prezidanto de la klubo. La ESPERO-anoj devis tiam mangi kune.

Kelkaj klubanoj elsakigis siajn telerojn kaj kulerojn, kaj la fraŭlinoj servantaj donis mangilaron al aliaj, kiuj ne havis proprajn. Ankaŭ al mi venis telero, kaj mi impetis al ESPERO-aneto, de kiu mi rabis kuleregon. La klubestro EBOE Hoeselo sidis kun mi sur la sama benko ; li provis elsalivigi la lipharon, sed ne tute sukcesis : Kiam gutoj malaperis, aliaj tuj venis. Niaj okuloj fiksigitis sur la fraŭlinojn. Ridegoj niaj ne malhelpis la disdonadon de rizo kaj saŭco. Mi rigardis al ĉiuj teleroj en la ĉambro : kiom plenplenaj ili estis !

Malantaŭ mi sidis la prezidanto de la klubo, s-ro KOSSI Logossou. Al mi ŝajnis, ke li volas mangi ankaŭ kompanse al la tago antaŭa, kiun li, pro siareligiaj aferoj, ne povis pasigi kun samklubanoj. Kokaĵo kuŝis sur lia rizo, kaj porkaĵo premadis la pladojn de la aliaj. Ĉiuj mangadis trankvile.

Krak! Krak! Lo nova prezidanto de ESPERO estis malpleniganta sian teleron. Mi ne komprenis, kial li tiom haste mangas. Ŝajne li kalkulis je siaj fortaj dentoj, per kiuj li premis parton de kapo porka. Hej ! Jen cerbaĵo el la porka kapo ŝprucis en liajn barbon kaj lipharon. Tiu nova koloro de liaj barbo kaj lipharo memorigas min pri la antaŭa tago, la 11a de julio : per sia ŝmirpano li buteris barbon kaj lipharon. Kun porkokapaĵo en la lipharo li tenis oston kun viando inter la buŝo kaj manoj. Venis al li samideano, kiu okulumis la kap-

aĵon, kaj direktis sian kuleron al la plado de s-ro EBOE.

Houo! Houo! bojis la nova prezidanto de ESPERO. Li subite prenis la teleron de sur la tablo, kaj metis ĝin sube sur la benkon. En tiu nova stato, li trankvile pludentumis la porkaĵon.

Mi poste ĵetis mian rigardon maldekstren. Kvarpersona grupo kun kompleta kapo de porko estis luktantaj. Ĉiu grupano viandon ŝiris el la kapo. La senharulo, s-ro SEMEGLO Efoé Mawuko proksimigis al la grupo, kaj eklaboris. Kelkajn minutojn poste, la kranio aperis nuda. Sciante, ke restas bongustaj eroj ene de la kranio, ĉiu volis akapari la ostaron.

Jo! Jo! Jo! tie, kaj Ĉo! Ĉo! Ĉo! tie ĉi ; la kvinopo disputis pri la kranio. Subite, s-ro DOUMEGNON Koffi rabis la kranion, kaj kure elĉambriĝis. Aliaj kunmangantoj lin sekvis. Tiam devis komenciĝi la rugbematĉo.

La vilaĝo ne havas stadionon. La korto de la elementa lernejo kun du golejoj utilas kiel stadiono. Kun la porka kranio en la mano, s-ro DOUMEGNON Koffi atingis la lud-ejon post kelkaj sekundoj da kurego. Li rapidis antaŭen, tenante tre forte la kapon. La senharulo, kiu volis almenaŭ leki la kranion, kuregis post s-ro Koffi. Mi nun komplimentas ambaŭ kuristojn, ĉar ili ŝajnis al mi veraĵ atletoj. En unu sekundo s-ro Koffi iris pli ol dek metrojn. La samon faris la senharulo, por kapti sian bofraton Koffi. Kiam unu akcelis, la alia same faris. Dume la aliaj kunmangantoj, entute tri por la kranio, promene kuretis sur la korto de la lernejo. Laciĝinte, s-ro Koffi transdonis la kranion al s-ro KONOU Medard, kiu pluigis la kuradon. La senharulo pli akcelis. Vidante kiel s-ro SEMEGLO ŝvite sopiras je porka kapo, s-ro Medard haltis : "Eble, vi bezonas la kapon. Mangante kapoĵon, vi rehavus harojn sur via kapo, ĉu ne ?" Li donis la kranion al s-ro SEMEGLO, kaj HOP ! La senharulo plukuregis. Dum pli ol kvin minutoj li kuris sola, antaŭ ol rimarki, ke neniu sekvas lin. Li haltis, levis la manojn kun la kranio super la kapon kaj ridegis : "Ho jes! mi gajnis. Al mi revenis la pokalo. Mi estas la plej forta." En ĝojo li lantis al soklo de flaga fosto, kontraŭ kiu li rompis la kranion kaj mangis la cerbon kaj karnerojn. Dume, en la ĉambro s-ro ADOKOU Folly estis voranta kolon kaj voston porkajn ; aliaj klubanoj tiam trinkis limonadon. S-ro Folly ne povis longe resti en la ĉambro, ĉar petoj de kamaradoj kolerigis lin ; li kuretis eksteren kun la mangajo, sed ĉi-fo-

je matĉo ne okazis, ĉar s-ro Folly donis la tutan manĝon al la petanto.

Jes, s-ro SEMEGLO rompis la kapon de la porko, kio simbolas "la rompado de kapo virŝafa". Ĉu tiu senharulo povus iam memori tiun feston? Se la manĝado de la kapo porka havigus al li harojn, li estus dankinta E-on, kies eterne komencanta lernanto li estas. Sed vidu, ke la prezidanto Hoeselo de ESPERO opiniis, ke liajn barbon kaj lipharon malbenis la manĝaĵo; tial, tuj post la rompado de la kapo virŝafa, li forigis ilin, kaj nun aspektas bela kaj juna. Do, per tiu juneca mieno li gvidos la klubon ĝis aliaj tagoj de rompado de kapo virŝafa.

**GBEGLO Koffi**

## ESPERANTA TAGLIBRO

Ĉe la kongreso de SAT, mi en restoracio sidis ĉe tablo kun francaj SAT-anoj, kaj ni parolis france. Tion riproĉis al ni kamaradino. Ni respondis, ke ni ĝenas neniun, ĉar estas nur francoj ĉe nia tablo, kaj nia konversacio koncernas nur nin. Ŝi respondis, ke dum kongreso oni devas paroli nur esperanton, ĉar la kongreso estas la nura okazo en la jaro paroli nian lingvon. Tio rememorigis al mi la respondon de la strasburgaj esperantistoj, kiam mi demandis, kial necesas esperanto-klubo por paroli en esperanto al samurbanoj: "Ni ne havas alian okazon praktiki esperanton."

Mi ne komprenas. Mi havas la impreson, ke mi vivas en Esperantio, mi kvazaŭ ĉiutage praktikas esperanton, mi spontane pensas en esperanto. Mi do supozas, ke mi estas iu unika specimeno, kies nenormaleco devas interesi esperantistojn same, kiel la virino kun barbo interesas homojn en foiro. Tial mi decidis noti dum unu monato ĉiujn okazojn, kiam mi praktikas esperanton.

Mi intence elektis periodon, dum kiu mi nek vojaĝas, nek kongresas. Notante mi ne povis antaŭvidi, ke mi ferios pro malsano de la 23a ĝis la 30a de septembro, kaj denove de la 4a ĝis la 8a de oktobro. Male, la paneo de la komputilo fine de la koncerna periodo ne povas esti konsiderata malkutima.

**ĵaŭdon 16an de septembro** : mi mendas ĉe la libroservo de la orient-franca federacio por esperanto la libron "La ronkanta avo". Mi legas la leteron, per kiu U.J. Moritz reagis al mia ekŝiĝo el IKEL.

**vendredon 17an** : matene mi respondas al U.J. Moritz; dum la tagmeza paŭzo mi eklegas "Eventoj"-n; dum la tizampaŭzo mi finlegas "Eventoj"-n; vespere mi foliumas la septembran numeron de "Sennaciulo".

**dimanĉon 19an** : mi vespere bonvenigas Janas, el Litovio, kiu estas mia gasto dum la semajno, en la kadro de la Pasporta Servo.

**lundon 20an** : vespere mi eklegas la ĵus ricevitan "Laŭte!"-n kaj babilas kun Janas. Mi komencas la redaktadon de la indekso de libro pri la kvakeroj, kiun mi estas tradukinta de la franca lingvo al esperanto.

**marton 21an** : matene mi plu legas "Laŭte!"-n kaj daŭrigas la laboron pri la indekso. Mi diras "bonan matenon" al Janas. Mi legas en esperanto la citaĵojn de la Biblio, kiuj estas komentataj en la ĉi-semajna numero de "Témoignage Chrétien"; dum la tagmeza paŭzo mi finlegas "Laŭte!"-n kaj verkas tekston por ĝi.

**merkredon 22an** : matene mi diras "bonan tagon" al Janas kaj relegas mian kontribuon al "Laŭte!". Mi legas ĵus alvenintan leteron de J.P. Colnot, la respondeculo de la regiona koresponda servo, kies korektonto mi estas por departemento Bas-Rhin. Li kunsendas la lernolibron "Metodo 11". Tagmeze, ĉar koleginoj volas aŭdi, kiel sonas esperanto, mi legas al ili la unuan lecionon de "Metodo 11". Vespere mi finlegas "Metodo 11"-n kaj interŝanĝas kelkajn vortojn kun Janas.

**ĵaŭdon 23an** : matene mi salutas Janas. Mi legas leteron de Will FIRTH, kiu pretas min gastigi en Berlino, kaj de Margret SCHATTENBERG, kiu trovis por mi gastigonton en Rostock. Mi legas leteron de Info-Servo pri homaranismo. Posttagmeze mi legas "Eventoj"-n kaj babilas kun Janas.

**vendredon 24an** : matene mi salutas Janas. Mi laboras por la indekso. Posttagmeze, dum mi atendas en trinkejo la malfermon de la butiketo de "Artisans du Monde" mi finlegas la numeron de julio/aŭgusto de "Sennaciulo" kaj eklegas tiun de septembro. Vespere mi adiaŭas Janas.

**sabaton 25an** : matene mi legas en la Biblio la citaĵojn komentatajn en la ĵus alveninta TC. Vespere mi laboras pri la indekso.

**dimanĉon 26an** : matene mi laboras por la indekso kaj legas "Franca Esperantisto"-n. Tagmeze mi finlegas la septembran "Sennaciulo"-n. Posttagmeze mi laboras por la indekso kaj legas "Rakontoj pri sarajeva sieĝo", de Zlatko Dizdareviĉ. Vespere mi verkas artikolon por "Sennaciulo" kaj pagas mian kotizon al UFE kaj la kotizon por la Esperanto-festivalo.

**lundon 27an** : matene mi daŭrigas la verkadon de mia artikolo por "Sennaciulo", kiun mi titoligas: "Kial ne klare diri, ke lantiismo estas kaduka?". Vespere mi laboras pri la indekso.

**marton 28an** : mi finas la verkadon de la indekso.

**merkredon 29an** : mi tajpas la indekson. En la lavaŭtomatejo mi eklegas "libere libere".

**ĵaŭdon 30an** : matene mi legas la leteron de Vlada HASALA, organizanto de la venonta SAT-kongreso. Mi reiras al la lavaŭtomatejo kaj tie finlegas "libere libere"

**vendredon 1an de oktobro** : vespere mi legas la leteron de Jiri PASTOR el Frydek-Mistek (Ĉeĥio) kaj tiun de Henriko WITONSKI, kiu pretas gastigi min en Gdynia (Pollando).

**sabaton 2an** : matene mi foliumas la ĵus alvenintan "Esperanto"-n.

**dimanĉon 3an** : vespere mi legas la citaĵon de la Biblio, kiuj estas komentataj en TC kaj finlegas "Magazino"-n, la organon de la germana Libera Esperanto-Asocio. Mi respondas al Henriko Witonski.

**lundon 4an** : mi legas "Esperanto"-n en la atendejo de la kuracisto. Mi foliumas "La Gazeto"-n. Mi skribas al Sally Philipps, membro de la Kvakera Esperantista Asocio, al kiu mi sendas la manuskripton de la libro, kiun mi tradukis.

**mardon 5an** : mi plulegas "Esperanto"-n atendante renkonton kun mia psikiatristo, kaj ĝin finlegas en la stacidomo, atendante la malfermon de la repaga ĝiĉeto.

**merkredon 6an** : mi legas la indikojn de UFE pri la festivalo okazonta en Parizo en novembro. Vespere mi respondas al Margret Schattenberg kaj Will Firth.

**ĵaŭdon 7an** : matene mi legas la ĵus alvenintan revuon "SAT-Amikaro".

**vendredon 8an** : ĉar Kristina Abt, la sekretario de la francaj kvakeroj, estas lernanta esperanton, mi esperantigas por ŝi la leteron, kiun mi sendas al la kvakera grupo de Parizo.

**sabaton 9an** : mi legas la vidkarton de Paul de Cooman, el Belgio, kiu estis gasto ĉe mi antaŭ nelonge, kaj leteron de UEA. Mi legas "Monato"-n kaj "Eventoj"-n.

**dimanĉon 10an** : mi legas "La Gazeto"-n. Vespere mi eklegas la romanon de Paul Kuusberg, "Sommermeze", tradukitan el la estona lingvo.

**lundon 11an** : dum la paŭzoj mi plu legas "Sommermeze"-n.

**mardon 12an** : dum la komputilo estas riparata, mi plu legas "Sommermeze"-n

**merkredon 13an** : ĉar la komputilo plu estas riparata, mi finlegas "Sommermeze"-n kaj ekskribas al Fredo Böhringer, el Wonnweil (Germanio).

**ĵaŭdon 14an** : dum la komputilo plu estas riparata, mi daŭrigas mian leteron al Fredo, kaj skribas al Nikolao Gudskov, ruso vivanta en Budapeŝto.

**vendredon 15an** : ĉar la kolegino, kiu zorgas pri la komputilo, petas, ke oni ne uzu ĝin antaŭ la lundo, mi skribas al Christian Baudé.

▼ Jacqueline LEPEIX

## KIO PLEJ GRAVAS EN LA VIVO ?

*Dum la pasintaj 59 jaroj, depost kiam mi forlasis la patrinan uteron, multaj malsamaj aferoj sinsekve ŝajnis "plej gravaj".*

### INFANO :

*Miaj unuaj memoroj, almenaŭ kiom mi povas tempe fiksi ilin pro flankaj okazaĵoj, kies dato aŭ almenaŭ jaro estas difinitaj, datiĝas en mia tria vivojaro. Mi memoras, ke iun tagon mia patrino, survoje al la subtegmentejo kun peza korbo da malseka, ĵus lavita tolaĵo, stumblis kaj falis de la sufiĉe kruta ŝtuparo. Tiam la plej grava en mia sento estis, ke Panjo, kiu ege suferis, baldaŭ resaniĝu.*

*Iom poste ni devis forlasi tiun malnovan domon, ĉar (tion mi eksciis nur jarojn poste) oni volis konstrui novan straton. Mi, trijara knabo, staris antaŭ la ruino de la domo kaj ne volis kompreni, kial oni forpelis nin de tie. Oni faris al ni maljustaĵon. Oni detruis mian hejmon, kie mi sentis min ĉiam tiel bone, protektata de Panjo kaj Paĉjo ! Tio estis mia ununura penso en tiuj tagoj. Ne ekzistis io pli grava. La nova hejmo, kvankam pli moderna, kun pli vastaj ĉambroj, tute ne plaĉis al mi.*

*Kion mi sentis poste, dum milita tempo, pri tio mi prefere silentu nun. Ankaŭ, kiam venis, du jarojn post militfino, la sciigo, ke mia patro ne revenis de patrolo. La letero perdiĝis ie survoje, ĉar nia hejmo estis ĉe la alia flanko de la fronto. Nur post du jaroj oni retrovis la leteron, kaj la poŝtisto alportis ĝin ĝuste la 24an de decembro. Dum tiu postmilita tempo por mi estis plej grava, kiel trovi ion por manĝi, por mi, miaj malgrandaj fratoj, kaj por Panjo.*

### JUNULO :

*Dum certa tempo "plej grava" estis solvi la psikajn problemojn, kiuj verŝajne pli-malpli turmentas ĉiun junulon dum tiu certa tempo. Mi provis diversajn specojn de aŭtosugesto, meditado, eĉ jogon laŭ diversaj skoloj ; sed ĉio ĉi nek helpis*

eviti malfacilaĵojn de la vivo, nek alkondukis ĝi la feliĉon aŭ iun "altan nivelon de spirita stato" aŭ "enlumigon". Miaj klopodoj sur tiu kampo neniel helpis solvi miajn psikajn problemojn. Eble mi ne sufiĉe ekzakte sekvis la instrukciojn de la "guruoj" kaj de la specifa literaturo. Studado de Freud, Jung, kaj similaj korifeoj ankaŭ ne alportis la deziritan efikon.

Mi cerbumis ankaŭ, kiamaniere plej bone kariere en profesio kaj vivo. Tamen baldaŭ la plej grava igis trovi kunulinon, kiu akompanu min dum la vivovojo. Sed ve! Nur tre malofte mi trovis knabinon aŭ junan virinon, kiun mi opiniis "sur mia ondolongo". Kaj kiam mi kredis esti trovinta la serĉegitan, ŝi tute ne samopiniis kun mi pri "ondolongo" aŭ "amo". Iun tagon mi tamen renkontis "ŝin", kiu ankaŭ reciprokis miajn sentojn. Ve! Mi devis sperti, ke mi estis tute malsimpatia al la patrino de mia kara amatino - kaj ankaŭ mia patrino lasis min scii, ke ŝi tute ne ŝatas tiun "inpersonon"; mia patrino emfaze deklaris, ke ŝi ne volas vidi "tiun personon" ĉe mia flanko. Dum tiu tempo por mi estis plej grave tiel akordigi amon al patrino kun amo al la estonta edzino; mi cerbumis ankaŭ kiel ŝanĝi sintenon de la bopatrino. Du jarojn poste mia kara amatino sciigis min, ke ŝi baldaŭ atendas "viziton de la cikonio". Tamen ŝi ne volis edziniĝi sen la beno de Panjo. Kaj tiu lasta (ĉu vi atendis ion alian?) des pli furioziĝis. Ĉar mia salajro estis malalta, mi decidiĝis iri eksterlanden, al Svisio, kie mi povis ricevi tiutempe preskaŭ trioblon por sama laboro. Mi trovis bonan laboron en Bern. La distanco de la loĝejo de mia fianĉino estis nur 200 km, kaj mi klopodis viziti ŝin ĉiun semajnfinojn, kvankam eĉ por mia bona salajro tio estis preskaŭ tro. Mi trovis vojon. Foje mi vojaĝis petveturante, kio ne ĉiam estis facila, kaj antaŭ ĉio tre temporaba. Dum somero mi ofte biciklis. Post pedaltretado dum la tuta nokto, mi alvenis plenlace sabatmatene, kaj dimanĉon tagmeze mi devis jam reveturi por esti London en la laborejo ankoraŭ laborpova. Mia bopatrino tiutempe almenaŭ jam permesis al mi tranokti en subtegmenta ĉambreto de sia loĝejo. Kompreneble ŝi severe atentis, ke la filino ne estu sola kun mi tie. Kelkajn monatojn poste mi sukcesis trovi eĉ pli bone pagatan laboron en urbeto iom pli proksima, la distanco al mia fianĉino tiel malpliigis al 160 km. Eluzante ĉiujn eblecojn pri fervoja rabato, mi nun povis vojaĝi ankaŭ fervoje. La loĝejo de mia fianĉino estis en Germanio, ĉe la franca land-

limo apud Rejno. Jam mi eltrovis, ke la franca fervojo postulis malpli ol duonon de la germana tarifo, tial mi prenis sur min la kvarŝojan limtransiron, en Baselo kaj Strasburgo. Foje tio estis problemo, ĉar kiel eksterlandano mi devis deponi mian pasporton ĉe la svisa polico dum mia restado tie, kaj mia deĵoro ne ĉiam permesis al mi iri ĝustatempe al la urbodomo por elpeti mian pasporton. Por ne rezigni pri la vizito ĉe mia fianĉino, mi montris ĉe la limo mian svisan "Legitimilon por Fremdlaboristoj", kiu verdire validis nur interne de Svisio. Malgraŭ tio, francaj kaj ankaŭ germanaj limgardistoj multajn fojojn lasis min senĝene pasi vidinte tiun paperon. Iun tagon tamen, transirinte la Rejnoponton de Kehl al Strasburgo, mi estis demandita de gardisto de la franca "Sécurité", kiu kontrolis iom pli severe mian "pasporton": "Kia paperaĵo estas tio?" Li petis min en la doganejon kaj demandis min, kie mi vivas, de kie mi venas, kion mi volas fari en Francio, ktp. Finfine, post konsulto de la ĉefo, li donis al mi grandformatan, plurfolian paperon, kiu permesis al mi travojaĝi Francion de Strasburgo al Baselo, kondiĉe ke mi forlasos Francion plej malfrue je noktomezo de la sama tago. Estis jam la 20a vespere. Mi atingis aŭtobuson, kiu veturigis min al la ĉefstacidomo, kaj tie mi kure sukcesis atingi mian trajnon al Baselo. Nun por mi "plej grave" estis, kiel eviti ripeton de tia evento. En la svisa urbodomo aŝabla oficisto malkaŝis al mi, ke anstataŭ pasporto mi povas deponi ankaŭ dokumenton pri mia ŝtataneco. Ĉe la germana ambasadejo en Bern mi baldaŭ ricevis tiun paperon, kaj nun mi havis ĉiam validan pasporton kun mi.

Iom post iom moliĝis la koro de mia bopatrino, kaj ok jarojn post nia unua renkontiĝo ni aranĝis geedziĝan feston en ŝia loĝejo. Eĉ mia patrino venis al tiu festo.

#### FAMILIA PATRO :

Pasis la jaroj. Mia kara edzino mortis. Mi trovis novan, bonkoran edzinon en lando tre malproksima.

La "plej grava" ankoraŭ ofte ŝanĝiĝis. Kaj nun? Kio nun estas vere plej grava? Nenio. Povus esti grava la certigo de postmorta vivo. Miaj du edzinoj kompreneble devus esti tie kun mi. Tie devus esti eterna harmonio. Al harmonio en la muziko apartenas alternado de altaj kaj malaltaj, laŭtaj kaj mallaŭtaj sonoj. Same devus esti ankaŭ la postmorta vi-

vo. - Tiu bela bildo de la "plej grava" en la vivo havas nur unu etan mankon : Mi jam vidis kaj spertis tro multon por kredi je tia iluzio. Ne eblas al mi trompi mian cerbon...

Do, restas nur zorgi, ke la korpo restu laŭeble sana, kaj ke ankaŭ la familio bonfartas - ĉar mia animo bezonas ilian aman zorgemon, sen tio mi estus nur ombro de mi mem.

Ni homoj juĝas nian etan, efemeran estadon tro grava. La universo estas eterna kaj senlima. Ĉu kun aŭ sen ni, tio ne- nion ŝanĝas.

Manfredo



\*\*\*\*\*

Noto de la red. : Ĉi-jare forlasis nin ĉies bona amiko Klemento MARTIN. Lia spirito, lia ridetemo, restas neforgeseblaj al tiuj, kiuj bonŝance konis lin. Memorige pri li, jen artikolo (de oktobro 1971) retrovita en arkivo.

## IOM PRI MULTO aŭ INTERPAROLO KUN NENIU...

Kiam oni tro pripensas, plejofte oni sin trovas antaŭ du aspektoj malsamaj, inside la dubo penetras la menson. Ŝajne la vivo estas stumbla kaj zigzaga irado. Ofte oni staras antaŭ du vojoj, nesciante kiu estas la ĝusta.

Jen ĉi-poste kelkaj okazaĵoj iom rilataj al tio.

Estis dum la lasta milito. Mi kun kamarado travagis la urbon, kiam ni renkontis enterigon kaj samtempe preterpasis sur la trotuaro du homojn. Unu diris al la alia : "Vidu tiun malgajan enterigon! " Malgaja enterigo ? Pleonasmo! Mia kunulo kaj mi preskaŭ ekridis. Tamen tiu diro instigis min pli atente rigardi tiun enterigon. Imagu : iu maljuna, malgaja, malgrasa, griza ĉevalo tiris la funebnan kvarrandan ĉaron. Anhelante, ĝi pene grimpis la stratdeklivon, ĝia kapo tiom kliniĝis, ke la buŝo preskaŭ tuŝis la ŝoseon. Sur la antaŭa supro, rigide sidis la koĉero, tiel malgrasa kiel la ĉevalo. Iu el ili, ĉu la homo, ĉu la ĉevalo, gvidis, sed ne estis eble diveni kiun. Ambaŭ aspektis kiel du nedisigeblaj partoj de iu aparato. Sur la veturila planko kuŝis kesteto surkovrita per nigra drapo laŭ la ordinara kutimo, infana ĉerko. Kaj, malantaŭe, nur unu viro, tute sola, nigre vestita, sekvis la veturilon. Jes, vere estis malgaja enterigo.

Je la komenco de mia laboro en profesio, kiun mi daŭrigis dum pli ol 35 jaroj, mi konatiĝis kun kolego. Tiu ĉi estis iamaniere mia estro, kvankam li mem estis subestro ; sed tio estas kutima, ĉiu el ni preskaŭ ĉiam estas subulo de iu pli-malpli superulo. Nu, tiu ĉi kolego, okaze de eventuala striko, alparolis min tiel : "Mi neniam strikas, ĉar ĉiu- maniere mi profitas. Se la strikintoj sukcesas, ankaŭ mi ricevos la "fruktojn"; se ili ne sukcesas, mi ne estos perdinta mian salajron." Ofte mi pripensis tion kaj konsideris lin kiel perfektan egoiston; Tamen, ĉu li tute malpravus ? En nia kapitalista socio multaj tiel rezonas. Pli-malpli devige tia socio instigas al ambicio kaj tiel kreiĝas karieristoj. Ambicio en si mem ne entenas malbonon. Ambiciulo strebas al pli alta pozicio ; por ĝin atingi li, ofte, streĉe studas kaj pliriĉiĝas sian scion. Sed atentu, ambiciulo facile, nerezysteme, devojiĝas al orgojlo, kio estas evitinda. Estas do necese bone koni kie staras la limo inter ambicio kaj orgojlo. Ĉiu bone scias, ke orgojlo kondukis al katastrofo ; sufiĉas memori pri Hitler aŭ Napoleono. Kiam tiuj nomoj okulfrapas nin, nepre venas al ni la penso pri milito. Foje trafis min la fakto ke, se iu iama konkeristo estus sukcesinta, la nacioj ne plu ekzistus aŭ eĉ neniam estus ekzistantaj. Ekzemple, se Persoj, Romanoj, Egiptanoj aŭ aliaj estus venkintaj, Azio, Afriko kaj poste Ameriko ne estus dividitaj en nacioj. Sed tio estas malproksime kaj malfacile elpensebla, dum la epokoj Napoleona kaj Hitlera okazis antaŭ nelonge kaj restas en niaj memoroj. Sed post kelkaj jarcentoj eble la homoj bedaŭros, ke tiuj ĉi krimuloj ne sukcesis en siaj entreprenoj. Oni ne plu memoros, ke homoj milione estis ekstermitaj dum militoj.

Sed kiamaniere eviti militojn ? Ne ĉiu el ni kapablas esti iu LECOIN. La plimulto kontraŭas militon, tamen mi legis antaŭ nelonge en gazetrubriko "La legantoj skribas" artikolojn de patriotoj, kiuj insultas la militrifuzantojn ; tio pravas, ke iuj restas militemaj. Komprenoble, en la sama rubriko mi legis artikolojn, kiuj rebatas ; tio estas kuraĝiga ! Preferras mi liton ol militon iri !

Pri alia afero : mortpuno. En la sama rubriko iu leganto postulas, ke oni restarigu la malnovajn torturojn sur rado, precizigante, ke la kondamnito estu ekzekutata antaŭ la popolamaso, kvazaŭ temus pri spektaklo. Ĉu oni kapablas imagi,



ke iu povas nuntempe postuli tiajn terurajn turmentojn ? Ankaŭ multaj rebatoj venis.

Kiam aperos la perfekta homo ?

En gazeto mi legis, ke ĝi aperos post unu miliardo da jaroj. Kompreneble neniu el ni povos kontroli tiun diradon. Do, ni povas atendi kaj eĉ ne movi fingron por akceli ĝian aŭeron. Tio povas esti sinteno de fatalema religio. Sed mi opinias, kvankam la celo estas malproksima, ke ĉiu el ni en sia medio devas helpi, kontribui, kaj se eblas, iĝi modelo, pri toleremo ekzemple. Sed ankaŭ ĉi tie oni ne bone scias, kie haltas la toleremo. Se oni tolerus ĉion je la nomo de aliula libereco, kelkiuj nomus nin "malkuraĝuloj". Toleremo havas limojn, sed kie ? Same pri libereco.

Iu bona amiko mia neniam konsentas pri iu ajn trudo je la nomo de la libero. Li ne ŝatas la aŭtoposedantojn sed tamen li uzas iliajn aŭtomobilojn. Kiam iu proponas transporti lin per sia veturilo kaj rendevuas je fiksita horo, tiu kamarado estas kvazaŭ ofendita kaj ne akceptas tiun horon. Li venos kiam li estos preta ! Ĉu li pravas ? Mi dubas. Malfacila estas la nocio pri libero. Multaj mortis pro ĝi, sed certe ne ĉiuj vidis la saman liberon.

En Francio oni rekomendas al ni voĉdoni. Kvankam la politikaj partioj estas multnombraj, neniu el ili kongruas kun miaj ideoj. Tamen mi voĉdonas ; ĉar mi estas maldekstrulo, mi voĉdonas maldekstren, nur por sciigi, ke iu estas kontraŭ la dekstrulojn. Ĝis nun en mia regiono neniu maldekstrulo venkis. Sed kiam tio okazos (certe iam tio okazos !) mi verŝajne plu voĉdonos por alia ankoraŭ pli maldekstrulo. Finfine, eble, iu kandidato havos la ecojn, kiujn mi postulas. Kelkaj rekomendas "ne voĉdonu !". Jes, tio estas maniero por protesti..., sed tio ne malhelpas, ke la dekstruloj estos elektitaj.

Mi kredas, ke iam (ne tuj, bedaŭrinde !) la religioj malaperos. Kiam la homoj estos raciaj, tiam la morala pravigo de la religioj ne plu necesos. Ankaŭ la stultaĵoj farataj aŭ dirataj de ili pli akcelos la malaperon.

Ĉu ne estas skandalo vidi la religiulojn almozantajn dum ilia mastro (Kristo por la kristanoj) estis la protektanto de la malriĉuloj kaj donacis ĉion al ili. Nun la malriĉuloj donacas al pli riĉaj ol ili. Per tiu ĉi religio (la katolika) multaj iros al paradizo. Oni parolis al mi pri Dikredantoj posedantaj grandan entreprenon. Ili loĝigas siajn dungitojn. Bone.

Sed la luprezo estas tre alta, tro alta, kaj la oficistoj vivas mizere. Tiuj ĉi iros al paradizo, ĉar ili estas malbone traktataj ; sed ankaŭ la posedantoj devos iri al paradizo, ĉar per siaj agoj ili provizumas ĝin kaj konsekvence meritos ĝin.

Okazaŭ ankaŭ, ke religiuloj estas elturnigemaj.

Onklo mia, simpla kamparaŭo, rakontis la jenon : Por konfuzigi sian paroŝan abaton li demandis lin pri la Trinitato kaj petis klarigojn. La abato respondis : "Estas simple. Komparu kun tridenta forkego ; ĝi havas tri dentojn, sed tamen ĝi estas nur unu forkego. Same pri DIO. Ĝi konsistas el tri personoj kaj tamen estas nur unu DIO". Mia onklo ne pensis pli longe kaj estis kontenta pri tiu klarigo. Tamen la abato ruze trompis lin. Tri dentoj vere konsistigis unu forkegon, sed ĉiu dento ne estas forkego, dum en la Trinitata mistero ĉiu persono estas Dio, kvankam la 3 personoj konsistigas nur unu Dion.

La scienco malaperigos tiujn stultaĵojn, sed kiam ? Ĝi rapide progresas sed la scienculoj ne ĉiam samopinias. Ĉu vi memoras, antaŭ kelkaj jaroj iuj scienculoj certigis, ke la atomeksplodoj tute ne endanĝerigas la homaron, samtempe aliaj tiom multnombraj kiom la unuaj certigis la malon. Ĉiam dubo ! Kaj kion pensi pri la aer- kaj arbarpolucio ? Ĉiam iuj kontraŭdiras aliajn. Ni ĉiuj aŭdis pri la fama D.D.T. insektomortigilo, abunde kaj sukcese uzata dum pluraj jaroj. Pasintan jaron oni trumpetis per gazetoj, radio kaj televido : ne plu uzu ĝin. Ĝi endanĝerigas la homan vivon. Bone ! Sed antaŭ kelkaj tagoj oni diris la malon kaj denove rekomendas ĝin ; ĝi estas danĝera nur por la insektoj.

Kion pensi ? Kion fari ?

Eble, inter la homoj, kiujn mi kritike riproĉis, troviĝas sinceruloj. Tial, kiam oni renkontas tiajn, konsilinde estas provi konvinki ilin pri ilia eraro (ĉar ni estas pravaj, ĉu ne ?) Ni devas trovi ĝustajn trafajn argumentojn. Kompreneble, ankaŭ nia kontraŭulo uzos argumentojn. Ĉar ni ne estas bestoj, ni kapablas diskuti, vikle, eĉ akre, sed sen uzi piedbatojn aŭ pugnofrapojn. Ni venku nur racie. Estas dirite : el diskutoj elsprucas la lumo ! Foje ĝi estas ne klara ! Vi komprenis, ke mi volas rakonti ion. Estu kontentaj, mi tuj rakontos.

Mi diskutis kun amiko, bonepensanto, patrioto kaj fervora

admiranto de nia eksvivanto la Granda Ĉionfarinta Generalo. (Degol, ndlr.). Li, inter alie, diris al mi, ke kiam li aŭdas la francan himnon Marseljezo, li sentas korpinĉon kaj li eklarmas. Mi ne ridis, ĉar mi ne ŝatas moki sinceran homon, eĉ kiam tiagrade ĝi iĝis idoladoranto. Mi provis elmontri al li la neutilecon de milito, la senutilecon de patrio, la malutilecon de generaloj (de ĉiuj generaloj). Sed vane. Finfine li aldiris min: "Mi scias, ke ci pravos, sed mi ne povas konsenti kun ci." Rapidpense mi anstataŭigis la vortojn "ne povas" per "ne volas" por bone reĝustigi la veran sencon, kaj fulme rebatis: "Ci diras, ke mi pravos kaj ci ne aprobas; do ci estas idio!" Mi humile konfesas, ke mi ne uzis tiun lastan vorton, sed maldecan francan unusilaban vorton tute malĝentilan. Tiajn vortojn oni uzas kun amikoj kaj mi asertas, ke mi ne ofendis lin, ĉar ni restis amikoj. Sed ne en tio kuŝas la celo de mia rakonto. Ŝajne mi malsukcesis konvinki lin, tamen mi povas diri: lia respondo supozigas, ke lia firma kredo ŝanĝeliĝis. Ni memoru: Ni semas kaj semas konstante... kaj kreskos ne nur lolo.

Jes, estas malfacile ne dubi; ankaŭ estas malfacile elekti la ĝustan vojon.

Por fini tiun senpretendan kaj supraĵan skribaĵon mi rakontos alian anekdoton:

Tio okazis en Greziljono. Hazarde mi vidis en la lageto iun kolubron manĝanta ranon. Sen longa pripenso mi kaptis bastonon kaj frapis la kolubron. La rano rapide fornaĝis kaj la kolubro malaperis. Mi fieris: mi savis la vivon de rano. Sed mi ne donis nutraĵon al la kolubro, mi tute ne zorgis pri tio. Kiel ofte, ŝajne bona ago ne estis tutfinita.

**KoMo.**

\*\*\*\*\*

En la varmo de la ĉi-jara somero la Muelejo de Bovilo akceptis por tre mallonga tempo viziton de Laŭtulo, kiu, supozeble inspirite de la tiea E-etoso, deziris antaŭ ol adiaŭi lasi verketon por venonta numero de nia gazeto.

Temas pri novelo ŝpruce naskiĝinta el fekunda kaj verva plumo, kiu ŝvebas tiel alte en sia arto, ke ĝi kvazaŭ alspitas la kritikon.

Tiun nekompereblan juvelon ni ĉi-poste liveras al via sagaco...

La red.

p-23

## EPISKOPO SIN TRUDAS

"Ĉi-jare mia libertempa periodo komenciĝos nur meze de aŭgusto!" amiko vespiris, dum nia rondogvidantino kolektis la plenigitajn aliĝilojn por Brajtono. "Se mi povus elekti, ja kreu al mi: mi ekkaptus la okazon veturi Britujen, kie mi jam delonge kalkulas multajn konatojn. De miaj fingimnaziaj jaroj mi ofte vizitas tiun landon, kies loĝantoj... kaj razenoj min ravas, la unuaj pro sia neŝancebla humuro, la duaj pro sia senkompara perfekteco."

Post la kunveno, kiam surstrate ni kunbabilis ĝis la disiĝa momento, li revenis al la temo: "Kia ĝojo estintus gastigi por kelkaj tagoj ĉe pastoro Tomaso W. kaj edzino, longe naĝi kun Filipo, mia komplica samaĝulo; ĝui la vastan skriboĉambron, kie bonodoras je vakso kaj ledoro; silente fumi kun la pastoro post gustumado de la diversspecaj keksoj, krakenoj, flanoj kaj pudingetoj, per kiuj S-ino Maria tiklas mian frandemon! Nur plej agrablajn rememorojn mi enmense gardas - eĉ pli ankore - pri miaj restadoj ĉe tiu amika familio. Krom tamen la fama nokto, pri kiu mi jam rakontis al vi.

- Al mi? Tute ne. Kial fama?

- Ha! De tiam multan akvon rivero Tamizo fluigis tra Londono..."

Ni staris ĉe la bushaltejo. Kiam, sub ŝuŝa bruo, la pordetoj malfermiĝis, ni preteratentis la mirigitan mienon kaj invitan geston de la ŝoforo, por kiu evidentis, ke nur strangulo povas staradi ĉe bushaltejo, ne tuj enŝovigante en nur duonplenan publikan transportilon, kiu ĝuste por ili haltas kaj malfermiĝas. Ni prefere piedvojis - kio helpas al rakontado.

"Mi estis nur 18-jaraĝa (mia amiko daŭrigis), kiam la duan fojon min akceptis gesinoroj W. Ĉu pro lia alta staturado kaj iel enigma rideto, ĉu pro lia supera kulturnivelo, mi sentis min embarasita en ĉeesto de S-ro Tomaso. Mia vortotrezoro tuj disperdiĝis dum mia promenado aĉiĝis. Tamen, iun sunoplenan posttagmezon li malfermis al mi la pardonon de sia skriboĉambro - tre malofta signo pri amikeco kaj estimo, Filipo komentis poste. Li sidigis min ĉe sia skribo-tablo, sur kiun li dismetis kelkajn rarajn specimenojn de ambaŭ niaj literaturoj. Mi estis klinita super la kortuŝaj "jonkviloj" de Wordsworth. Ambaŭflanke de la versoj gracie

serpentumis la skizitaj floretoj. Kiam mi levis la okulojn, mia rigardo sin kroĉis al tiu de glacia altrangulo, violkoloro vestita, kiu pompe tronis en longoforma ora kadraĵo. La okuloj, profunde enigitaj en la okulkavoj, algluis siajn fiksaĵn pupilojn al tiuj de la kontraŭstaranto, kiu sentis sin kvazaŭ admonata, iel minacata kaj superregata. S-ro Tomaso rimarkis mian miron kaj ĝenon kaj laŭkutime tuj venis klarigo: "Vin fascinas tiu olea pentraĵo, ĉu ne? Ĝi datumas de la mezo de la XVII-a jarcento. Ĝi prezentas episkopon, kiu famiĝis en nia urbo sub Kromvelo. Tiel hipnotiga estas la rigardo, ke ĝi trudas nepran okulmalleviĝon. Vidu, kiel la fingroj kuntiriĝas sur la episkopa bastono, dum sombre glimas la gemo. Observu, kiel la alta mitro ŝajne suprentiras la altkreskulon. Eĉ la pendkolumo kaj talaraj faldoj kontribuas al sendiskuta majesto. Tiun neagnoskitan artaĵon - unuarangan, mia opinie - mia praavo forsavis de vendo eksterlanden kaj nia familio fieras ĝin transdoni de generacio al generacio."

Li paŭzis, dum miaj okuloj sin deturnis de la konfuziga episkopa moŝto.

Reveno al niaj ŝatataj romantikuloj. Je la oka p.m., familia vespermanĝo. Ĝis noktomezo ŝakludado kun Filipo, kiu min obstine supervenkis. Finfine ni senbrue surgrimpis la ŝtuparon kaj post amika salutvorto retiriĝis en niajn apartajn dormoĉambrojn.

Plenlunis. Duonfermante la fenestron, mi ĝuis la spektaklon de la ĝardeno en nereala blanko baniĝanta kaj enpense revivigis la kontrastajn tagkolorojn kaj sunvarmon. Tiuj agrablaj imagoj lulis mian unuan dormon.

Iom da malvarmeto min vekis. Mi kontrolis la horon sur mia brakhorloĝo: nur la dua matene. Mi suprentiris la molan plumonon kaj sentis min tute bone. Kun l' okuloj malfermitaj mi fantaziadis en plena malstreĉo pro la endoma kvieto, ĝis la momento, kiam mi plenpulme hurladis: litpiede sidis violkoloro vestita altkreskulo, kies admona rigardo min traboris. Kuntiriĝis la fingroj sur la episkopa bastono, dum sombre glimis la gemo. La mitro balanciĝis en kvazaŭa kapjesa movo.

Ĉiujn familianojn vekis kaj teruris mia sovaĝbesta kriego. Ili ekimpetis en mian ĉambron. S-ino Maria tuj pensis pri

noktuo, kiu envenis tra la duonfermita fenestro kaj mian antaŭbrakon trankvilige tuŝetis. Sed pri noktuo, ja nenio. Pli amika fariĝis la rideto de S-ro Tomaso. Li atente ĉirkaŭrigardis kaj rimarkinte nenian kialon por ekscitiĝi eldiris sian konkludon:


- Premsonĝo vin vizitis, mia knabo. Mi kontrolis: ĉio en ordo, Fidu al mi, amiketo.
- Sed... mi estis plenveka (mi sukcesis elartikigi). Piedlite li sidis!
- Li? Kiu, mia knabo?
- La... episkopo, S-ro Tomaso.
- Ŝajnis al vi, ke vi estas plenveka, sed vi sonĝis, ke vi estas tia. Jen la tuto. La skriboĉambra pentraĵo vin impresis kaj la severa rigardo hantis vian dormon. Nenio alia, krom nervoskua inkubo. Mia edzino baldaŭ donos al vi sendaĝeranan dormigilon kaj post kelkaj ripozhoroj vi sentos vin tute revigligita.

Kvankam plej afablaj kaj komprenemaj, kvankam prifantomaj travivaĵoj ne mirigas en Britujo, gesinjoroj W. neniam kredis je la aŭtenteco de la vidaĵo. Tamen eĉ en la mortohoro mi ne reprenus mian vorton pri ĝi. Tio estas la nura nubeto, kiu iam ŝvebis inter ni.

- Vi tamen kuraĝis denove gastigi ĉe ili kaj alfronti la frostotremigan eminencon, ĉu ne?
- Oni sciigis min - kvazaŭ pretere -, ke la eminenco moŝto migris al la urba muzeo, kien mi iris por sentima saluto. Scioplenan komentario la ĉiĉerono liveras al la vizitantoj. Sed mi prefere ne demandis, ĉu la noktodeĵorantoj iam menciis nenormalan okazintaĵon de post la tiea enoficigo de la respektinda ekleziulo."

Finiĝis la rakonto ĉe mia domsojlo. Duonhoron poste, la televida programo proponis intervjuon de nia Gaŭla Primaso. Sed ne glacia estas lia rigardo. Tial mian dormon li ne hantis. Ne ĉiuj episkopoj sin trudas!

S. BONIOL.



## MALFACILA PROBLEMO DE LA EŬROPA KOMUNUMO

La ebleco de Unuiĝinta Eŭropo persvadas nin preni konkretan teniĝon antaŭ unu el la plej malfacilaj problemoj de la Eŭropa Komunumo : la lingva interkomunikado. La registaroj estas en dilemo : ĉu angla aŭ plurlingvismo ? Multaj el ili preferas plurlingvismon, ĉar ili ne akceptas la anglan superecon. Ĉiuj volas samajn rajtojn kaj ne nur unu solan internacian lingvon en la lernejoj. Esperanto estas repuŝata kaj ankaŭ ignorata de multaj intelektuloj, kio estas la plej granda malestimo. Multaj ŝtatoj timas, ke la esperantista solvo forlasos ilian propran lingvon en la monda planado. Plie, se la popoloj ne postulos Esperanton, neniam la ŝtatoj volos defendi ĝin, ĉar la politikistoj ĉiam obeas siajn partianojn kaj elektantojn. Evidente, en neniu granda partio estas personoj, kiuj petas Esperanton, ĉar la plejmulto komprenas, ke la angla lingvo sukcesas ĉie ; kaj la gepatroj volas, ke iliaj filoj lernu ĝin. Do, estas tre malfacile persvadi gepatrojn kaj registarojn. Ĉiuj preferas praktiki la anglan lingvon kaj atendi, ke rutino kaj tempo donu la solvon. Esperanto ne malkvietigas ilin.

Antaŭ tiu situacio, ni kredas, ke la plej bona tasko estas iniciati kampanjon en ĵurnaloj favore al Esperanto pro ties neŭtraleco kaj facila lernado. Eŭropo hodiaŭ bezonas komunan kaj neŭtralan lingvon kaj la esperantistoj ne povas perdi tian oportunajon. Estas necese, ke la ĵurnaloj de nia Kontinento raportu pri la lingva problemoj laŭ nia vidpunkto, por ke multaj personoj atentu tiun aferon. Ni nepre devas pruvi, ke plurlingvismo estas torturo por la lernantoj kaj tio estigas grandan perdon de tempo, kiun oni povas dediĉi al pli profitdonaj temoj. Samtempe oni devus ebligi popolan konsultadon por atingi, pri tiu problemoj, opiniojn el la plej granda nombro da personoj. Estas necese elmontri la internacilingvan problemon por elekti inter 4 proponoj :

1. Plurlingvismon.
2. Dulingvismon (angla kaj Esperanto).
3. Nur Esperanton.
4. Nur la anglan.

Se oni povus ricevi multajn konsiderojn favore al Esperanto, ni povus komuniki rezultatojn al la Eŭropa Parlamento kaj al la tuta ĵurnalaro.

Ni proponas tiun ĉi iniciativon al ĉiuj esperantistoj kaj speciale al UEA kaj SAT. La plej elstaraj personoj de la E-movado devas sin turni al la plej gravaj ĵurnaloj de ĉiu lando. Plie, la E-organizacioj devus plenumi unuece kampanjon favore al starigo de UNU internacia lingvo (neŭtrala kiel Esperanto) sen rifuzi UNU alian lingvon internacian (disvastigitan kiel estas la angla) por ke ili estu lernataj en la lernejoj. Ne estas necese esti kontraŭ adeptoj de la angla lingvo, sed oni devas rimarki, ke plurlingvismo el tri aŭ kvar lingvoj estas neutila klopodo kaj grandega eraro de politikistoj, kiuj pro nacieca orgojlo deziras torturi la junajn lernantojn.

P.M.

(Red. noto : Tiun ĉi tekston - kiun mi iom lingve korektis - ni ricevis de "TUTMONDE", pacifista movado, Apartat 313, E-08220 TERRASSA)

## E-REKTA METODO

Marko paŝas malsekure sur la ŝtonplena aleo, senzorge pri la direkto kaj la tempo de kiam li vagadas.

En lia cerbo boladas dilemo delonge ŝvebanta, kies solvon li ankoraŭ ne vidas. La fakto, ke de antaŭ kvar monatoj li ne spertas erekton, estas la malplej granda el liaj problemoj. Nun kio ege maltrankviligas lin, estas la manko de kono. En lia poŝo sidas la fonto de lia nuna obsedo : nur broŝureto, en kies titolo bare staras vorto de li nekomprenebla. "La nova paradigmo en psikologio". PARADIGMO, plej enigma vorto ! Kion ĝi signifas ? Jen la demando, kiu de antaŭ unu semajno frenezigas Markon ĝis tioma grado, ke li forgesis sian same nove akiritan senpotencon. Estis antaŭ du monatoj, kiam lia edzino ultimatis : "Ĉi-nokte vi min fikis aŭ mi forlasos vin!". La postan matenon ŝi foriris kun fervoĝisto, eksa komunisto nun vendanta asekuraĵojn en sia libertempo. De tiam Marko dronas en puto de malfeliĉo, kie nur nigro akompanas lin. Sed nun jen venis la vorto "paradigmo" por pruvi, ke ĉiam eblas malpliboniĝo. Li konsule anstataŭigis sian perditan virecon per sia certeco, ke li, post dudekkvinjara esperantismo, tute regas la Internacian Lingvon, ke lia leksikono estas, pli ol ampleksa, kompleta. Nun li konstatas, ke lia vortoprovizo lamas same kiel lia malalta ventro, kaj tio ĉio lasas Markon ĉe la rando de la plejaj turmento kaj frenezo. Senpotenco sekse, senpotenco esperanta, PARADIGMO.

Antonio Alonso en sia dekvoluma studaĵo "La sensigniĝo kaj la netradukeblo" ne mencias ĝin. Senespero resumas la staton de Marko. Malvivo ŝajnas nun la sola solvo.

Verda fulmo zigzage strekas la ĉielon antaŭ Marko, kiu, blindigita kaj timoplena, ekkrias :

- Haaa !

- Ne timu, samideano, mi estas Ludoviko.

Marko surgenuiĝas kaj balbute respondas :

- Hooo, la Majstro ! Nur Vi povus helpi min en mia senespero.

- Ne, ne mi, samideano, mi ne estas tia.

- Kion Vi diris... ?

- Sed mi ja scias kiu certe enordigos vian obsedon.

- Jes, Majstro... sed kial ne Vi persone ?

- Ne, samideano, mi neniam rilatis kun viroj.

- Ĉu ? Mi ne komprenas...
- Jes, mi konstatas, ke via kompreno estas iom rusta, tial mi staras nun ĉi tie fronte al vi. Turnu vin al Klara, ŝi tute kontentigos vin.
- Ĉu Klara ? Ŝi estas nur komencantino. Neniel ŝi povus helpi min.
- Ho, mi komprenas. Vi bezonas iun pli spertan. Kio pri Blanka ? Ŝi ne estas aparte bela, sed ŝi perfekte taŭgos.
- Mi dubas, ke ŝi kompetentas. Ŝi eĉ vartas ldon de antaŭ kelkaj monatoj. Krome, Majstro, en ĉi afero ne gravas beleco aŭ malbeleco.
- Ho, kompatinda samideano ! Al vi ne plu gravas la beleco. Nu, provu kun Isabela.
- Ĉu Isabela ? Ĉu la putino de la vilaĝo ? Sed ŝi eĉ ne estas esperantistino !
- Sed tio tute ne necesas. Kiom mi scias, ŝi havas tre bonan erektan metodon...
- E-REKTAN METODON !

La postan vesperon Marko vizitis Isabelan. Li pagis kiel ajna kliento kaj demandis ŝin pri la signifo de la ĝena vorto. Ŝi ne respondis, nur uzis sian erektan metodon, tŭ tute ne fuŝis. Kaj Marko havis la plej sovaĝan orgasmon de sia vivo.

**Pakulo.**

\*\*\*\*\*



## "Lazura anĝelo de la kvardekjaraĝo"

Joan Collins naskiĝis la 23an de majo 1933. en Londono. Ŝi estis nepino de aktorino kaj dancistino Henrietta Collins. Ŝia patro, Joe Collins, estis impresario. Ĝuste tio kaŭzis, ke Joan de fruaj jaroj havis kontakton kun arto.

Ŝi debutis en aĝo de naŭ jaroj en Ibsena "Domo de Pupo". En la j. 1948 ŝi komencis studadon en Reĝa Akademio de Drama Arto. Samtempe ŝi laboris kiel fotomodelistino. Ŝi an foton rimarkis film-agento kaj tuj proponis al ŝi laboron en filmo. Ŝia respondo estis antaŭvidita : "Mi volas esti serioza aktorino."

Ŝia filmdebuto okazis en 1952 ("La Virina Vidpunkto" - "The Woman's angle"). Ŝi gajnis nur 200 \$, sed la filmo faris, ke ŝin rimarkis seriozaj reĝisoroj (i.a. Howard Hawks).

En la 50aj jaroj en Britio ŝi fariĝis "stelo" de granda formato. Deksep jara ŝi edziniĝis kun Maxwell Reed, sed jam post kvin monatoj okazis ilia eksedziĝo. Tuj poste ŝi veturis al Hollywood, kio donis al ŝi laboron en ĉ. 50 filmoj. Sed aliflanke tio ne estis facila kaj bona periodo en ŝia aktor-eco.

Duafoje ŝi edziniĝis, kun kantisto Anthony Newley. La edziĝo daŭris tri jarojn. Dume, vivo ne sukcesis al ŝi. Do ŝi decidis reveni al Anglio. Estis komence de la 70aj jaroj. Ŝi ludis ĉefe en komedioj kaj hororaĵoj. De tiu periodo devenas unu el ŝiaj plej bonaj filmoj "Ĉevalviro", laŭ romano de ŝia fratino, Jackie Collins. Poste ŝi revenis al Hollywood. Verdire ŝia filmkariero finiĝus, se ne estus...

... "Dinastio".

Laboron en la "serio" proponis al Joan Collins la kreintino de la scenaro Ester Shapiro. Demandite kiel al rolo de Alexis ŝi elektis Joan Collins, ŝi respondis : "Simple intuicio. Neniu ŝin volis. Oni opiniis, ke ŝi estas aktorino sen talento. Komence ni proponis al ŝi ludi en kelkaj partoj, sed poste kune kun Richard (edzo de E. Shapiro kaj kunkreinto de la scenaro) ni orientiĝis, ke ŝi estas vera trezoro." La rolo de Alexis okazis por ŝi plej bona el la plej bonaj. Laŭ ŝiaj geamikoj Alexis kaj Joan estas similaj. Iam, veturante por Los Angeles, ŝi svingis per mano al infanoj. Ili dankis per vortoj : "Ŝi estas la simio Alexis."

Komencante laboron en "Dinastio", ŝi triafoje edziniĝis. Ĉi-foje kun Ronald Kass. Ankaŭ tiam ne daŭris longe. Laŭ Kass la eksedziĝon kaŭzis la tro granda populareco de Joan.

En jaro 1985 ŝi edziniĝis kun Peter Holm. Post 13 monatoj ili eksedziĝis.

Joan Collins estas patrino de Tara, Alexander kaj Katyana.

Ŝi ludis ankaŭ en teatro (i.a. en "Private Lives"). Oni devas aldoni, ke ŝi ankaŭ verkis aŭtobiografiajn librojn. Unue "Past Imperfect" kaj poste "Prime Time" kaj "Love & Desire & Hate".

Nun 60-jara, Joan Collins ĉiam provokas. Malgraŭ ĉio, ŝi fariĝis unu el la plej famaj aktorinoj. Oni komparas ŝin al Marlena Dietrich kaj Greta Garbo. Ŝi estas simple plej bona kaj plej bela. Ŝi loĝas en Hollywood, kie ŝi havas 20-ĉambran domon kun baseno kaj 10 hektarojn da arbaro.

Tamen nuntempe plej ofte ŝi pasigas tempon en belega vilao proksime de Saint-Tropez en Francio.

\*

En Britio oni kreis fan-klubon de Joan Collins, kiu laboras kun la bonega aktorino. Ĉiujn informojn petu en angla lingvo ĉe :

THE JOAN COLLINS FAN CLUB, 44 Celeborn Street,  
South Woodham Ferrers, CHELMSFORD, Essex CM3 7AE, Britio.

(Tiu artikolon verkis Remigiusz GRZELA pro peto de Paul Keylock-sekretario de The Joan Collins Fan Club).


### LA VOJOJ DE GLORO ("Paths of Glory")

En Laŭte ĝis nun mankis rubriko(j) pri diversaj artoj. Amiko Grzela ĵus malfermis tiun pri kino, laŭdante al la "heroino" de la fama usona serio "Dinastio", kiu ja supozeble nenie estis celo de cenzuro. Male, pri "La Vojoj de Gloro", filmo de Stanley Kubrick (1958), la franca cenzuro draste frapis, malpermesante ĝian disvidiĝon en francaj kinejoj dum 15 jaroj. La kialo ? Simpla : temas pri tiuj francaj soldatoj de la unua mondmilito, kiuj estis mortpafitaj "ekzemplodone" por redoni kuraĝon al la ceteraj...

Nun la filmo estas libere spektebla, eĉ aĉetebla en videokasedo. Ekzemple, enprogramigis ĝin la bonega, do malmulte rigardata TV-dissendilo "ARTE" en novembro 1993. Nekuracebla kontraŭmilitisto, jam de tridek jaroj mi sopiris vidi ĝin. Ĝuste pri la sama temo, kiu nun memoras pri tiuj ĉiam prisilentitaj epizodoj de la unua mondmilito, pri la libro de Blanche Maupas, kiu, pro la franca cenzuro de la jaroj '50, devis aperi kiel suplemento de franclingva pacista gazeto ???

Ĉu eble oni opinias, ke ne plu laŭmodas tiuj pacistaj klasikaĵoj ? Ve, trioble ye ! Ne nur soldatoj estas nun mortigitaj "ekzemplodone", sed ja miloj da "civiluloj", tutaj gentoj. Ĉu "gloro" ankoraŭ rolas tokse ? Eble ne. Nun oni mortigas purige. Pureco, nia nova diaĵo.

Kribo.



Kio nova ĉe la aŭguristoj ?

Patriko :

1999

Kio okazos en 1999 ? Al tiu demando respondojn alportis la ĉefaj profetaĵoj, kiuj plejparte traktis la ĉi-nunan periodon. Kompreneble, 1999 estas la lasta jaro de nia jarcento kaj samtempe jarmilo nur pro tio, ke nia kalendaro ehas en jaro O, kiu estas falsa naskiĝjaro de Kristo... Sed ĉu hazarde ?

Astronomoj kalkulis la daŭron de la tria termoviĝado (precio de ekvinoksoj), ĝi daŭras 2148,8 jarojn kaj 2148 jarojn antaŭ 1999 estis tria punika milito kaj fina aneksado de Grekio far Romio, tio estas eko de tute nova epoko en la historia procezo...

"L'an mil neuf cent nonante neuf sept mois  
du ciel viendra un grand roy d'effrayeur  
ressusciter la grand Roy d'Angolmois  
avant après Mars régner par Bonheur."

(Nostradamo)

Kiu estas tiu terura ŝtatestro, kiu venos en 1999 el malproksima insulo por liberigi Francion kaj tutan Eŭropon de malamikaj invadintoj kaj restarigos lastan Papon, kion ni estas vidontaj nun ?...

El la plej famaj profetaĵoj estas unu, kiu pli ol aliaj konfuzigas onin. Temas pri la profetaĵo de Sankta Malaĥio el la XII-a jarcento, kaj kiu liveras liston de 111 papoj ĝis la fina tempo. Jen la 3 lastaj :

109 - De meditate Lunae (el duono de la Luno)

110 - De labore solis (el laboro de la Suno)

111 - De gloria olivae (el gloro de l'olivarbo)

La 109a rilatas al Johano Paŭlo I, kiu reĝis duonon de monato (luno).

La 110a estas J.P. II.

La 111a estos la lasta papo kaj ekreĝos en 1999, kion ni vidu sekve...

"Vingt ans du règne de la Lune passé

Sept mille ans autre tiendra sa monarchie

Quand le soleil prendra ses jours lassé

Lors accomplir et mine ma prophétie."

(Nostradamo)

Tio estas : post 20 jaroj de post la reĝado de J.P. I kaj kiam J.P. II ĉesos reĝi, alia papo reĝos ĝis la sepa jarmilo (Biblia tempo). Ni havu do la koncernatajn datojn :

- 1978 : J.P. I
- De 78 al 99 : J.P. II
- De 1999 ĝis 2000 (?) : De gloria Olivae (Petro II)

Kion konfirmas alia profetaĵo, tiu de la Benediktanoj eltrovita en 1945 en ruinoj de germana monaĥejo kaj kiu anoncis por tiu jaro 1945 la morton de kruela leono. Jen la profetaĵo rilate la nunan jardekon :

- 1990 : sopiro en la ĉielo
- 1991 : lumo en la mallumoj
- 1992 : la falo de la steloj
- 1993 : la morto de la homo
- 1994 : la bleko de la sovaĝa besto
- 1995 : la ploroj de la patrino
- 1996 : inundo de la tero
- 1997 : la morto de la Luno
- 1998 : gloro en la ĉielo
- 1999 : la nova Petro
- 2000 : la triumfo de l' olivarbo.

Kaj tiu dato 1999 ne estas iu dato inter multaj. En la profetaĵoj de Nostradamo ja estas nur 3 datoj, kiuj ĉiuj estas ĉefaj simbolaj kaj historiaj datoj :

- 1732 : Alveno de J.J. Rousseau en Parizon kaj komenco de la revolucia procezo per ties ideoj.
- 1792 : Fino de la monarkio en Francio kaj, laŭ Nostradamo, komenco de la renoviga tempo.
- 1999 : Fino de la renoviga tempo kaj same de la profetaĵoj.

Ĉiuj tiuj profetaĵoj kaj ceteraj havas komunan fonton : la romkatolika eklezio, kaj ankaŭ komunan mesaĝon : la finiĝo de nia nuna tempo kaj de ties eklezio, la romkatolika... Ili parolas pri granda terura milito, kiu detruos multajn ĉefajn urbojn (Parizo, Liono, Marsejlo) kaj landojn (Italio, Germanio, Svisio ktp...), pri granda franca reĝo, kiu militos kune kun lasta Papo kaj estros teritorion pli vastan ol Eŭropo, ĝis kiam venos Antikristo, kiu pereigos la tuton...

Sed kion mi deziris reliefigi ĉi tie, tio ja estas konverĝo ĉirkaŭ tiun jaron 1999, kvankam, kiel mi jam traktis en iama artikolo, la ĉi-nunaj jaroj 93 ĝis 99 estas ja danĝerplenaj.

Valoras do bondeziri al ĉiuj feliĉan novjaron 1994 !

Balasto, balasto, balasto.

La nun oficiala vortaro de Esperanto, nome nur la radikoj navigitaj de la "Fundamento" kune kun la novaj, relative malmultaj, vortoj oficialigitaj de la Akademio, laŭ iuj Esperantistoj preskaŭ sufiĉas por esprimi ĉiujn nociojn uzatajn en lingvouzo. Preskaŭ, ĉar ili akceptas nove kreitajn vortojn por kelkaj, nur kelkaj, el la nocioj pri novaj inventoj teknikaj. La aliaj Esp-istoj, verŝajne la plimulto (certe inter la konataj "produktantoj" de Esperantaĵoj), sentas la bezonon pligrandigi Esperanton per la kreado de novaj vortoj, neologismoj, adaptante fremdajn vortojn, precipe anglajn nuntempe.

"Plena Ilustrita Vortaro" publikigis tre multajn el tiuj neologismoj. Se por unu nocio estis kreitaj du aŭ pli da neologismoj, P.I.V. enhavas aŭ ambaŭ, aŭ elektis la laŭ ili plej "ĝustan". Sekve preskaŭ ĝia duono konsistas el tiaj neologismoj, dum la resto de la vortoj estas oficialaj, tiuj kiuj ja sufiĉas laŭ parto de la Esperantistaro. Ne strangas do, ke P.I.V. estas tiom dika, sed ĝia por la lingvo plej malfavora eco estas, ke malklare vidiĝas la diferenco inter oficialaj vortoj kaj proponitaj vortoj neoficialaj (la neologismoj), kaŭzante ke la kara gesamideanaro uzas nedistinge ambaŭ arojn de vortoj, kvazaŭ ĉiuj estas oficialaj, kvazaŭ la neologismoj estas same uzindaj. Pro tiu manko de klaraj distingo kaj averto pri la diferenco la respondeco de P.I.V. pri la nuna historia direktoŝanĝo de Esperanto, eble kondukanta al ĝia neakceptado pro nefidebleco aŭ pro karaktersimileco al etnaj lingvoj, estas do grandega, kaj eble decida.

Krom la nebuleco de P.I.V. aliaj kaŭzoj de uzado de nenecesaj neologismoj estas la jenaj.

Spertaj Esp-istoj verkantaj multe tamen ne ĉiuj estas sufiĉe spertaj por krei mem ĉiujn bezonatajn kunmetaĵojn per oficialaj radikoj por nekutimaj nocioj aŭ por novaj nocioj ĝenerale teknikaj. Tiukaze estas pli facile uzi fremdajn vortojn.

Nespartaj Esp-istoj tro frue uzantaj larĝe la lingvon inklinas fari la samon.

Spertaj Esp-istoj multe verkantaj ne trovas ofte la tempon pensi en Esperanto kaj tiel konstrui vortojn per kunmetado de oficialaj radikoj. Pli rapidas tiam uzi fremdajn vortojn (kompreneble adaptitajn, kvankam eĉ ne ĉiam, al Esperantaj literumo

kaj finajoj).

Pluraj Esp-istoj havas la science strangan ideon, ke lingvo devas evolui per ŝanĝado de gramatikaj reguloj, per ŝanĝado de vortoj, per ŝanĝado de signifoj, kaj per ĉiĉa aldonado de novaj vortoj (neologismoj). Efektive la etnaj lingvoj daŭre ŝanĝiĝas; vortoj ŝanĝas siajn signifojn, malnovaj vortoj aŭ vortkunmetaĵoj komencas uzati por novaj teknikaj inventoj (kaj la malnovaj signifoj kelkfoje apenaŭ plu uzatas, ekz. "polucio", aŭ uzas alian vorton); gramatikaj reguloj kaj indikiloj ŝanĝiĝas aŭ ne plu uzatas (ekz. la angla por "kiun" nuntempe ŝanĝiĝas al "kiu"); kaj la formo kaj prononcado de vortoj ŝanĝiĝas. Sed tiaj ŝanĝoj, eĉ se oni nomas ilin evoluo, ne estas pliboniĝo nek pliriĉiĝo kaj ne estas necesaj. En la lingvo de Ŝekspiro li kapablis uzi ĉiujn samajn ideonuancojn kiel en la nuna angla. Ke Esperanto devas "evolui" per ŝanĝado kaj per vasta uzado de fremdaj vortoj estas mito. Bezoniĝas nur kelkaj neologismoj nur por tiuj novaj nocioj teknikaj por kiuj ne eblas (ĝenerale pro troa longeco) uzi novajn kunmetaĵojn de oficialaj radikoj.

Aristokratecaj Esp-istoj (tiuj kiuj pensas, ke ili havas pli da rajtoj ol la ordinaraĵoj, ekz. pro iu artisma supereco) maldemokrate uzurpas la rajton juĝi, kiuj vortoj estas belaj kaj kiuj estas malbelaj, kaj kiuj sekve uzadas "belajn" fremdajn vortojn (kiel ekz. "trista" kaj "bunta"), nenecesajn neologismojn. Tiuj malkuraĝuloj ne kuraĝus uzi "belajn" fremdajn vortojn anstataŭ la (multaj) "malbelaj" vortoj en sia propra etna lingvo. Konsekvence, kaj demokrate, ĉiu kara Esp-isto rajtus tiukiale ŝanĝi dekon aŭ centon aŭ milon da "malbelaj" Esperantaj vortoj.

Grandaj poetoj kapablas uzi la vortaron de sia lingvo spite ties naturan rigidecon. Ili ne povas nek bezonas ŝanĝi aŭ "pliriĉigi" sian lingvon por krei artaĵojn. Ke en Esperanto niaj poetoj ĝenerale uzas aregon da fremdaj vortoj (neologismoj), kaj eĉ ŝanĝas kelkfoje la gramatikregulojn, estas pro tio ke ili estas bonaj sed ne grandaj poetoj, ne sufiĉe grandaj en Esperanto. Zamenhof ne bezonis neologismojn.

Multaj Esp-istoj estas tre patriotecaj. Se la sama fenomeno troviĝas en pluraj landoj, ili tamen deziras apartan vorton en Esperanto por tia fenomeno en sia lando, kaj ili do devas krei neologismon. Leĝproponoj okazas en ĉiuj landoj, sed kiam ili okazas en la parlamento brita, ili bezonas specialan vorton, nome "bilo". Pluraj landoj havas siajn indiĝenojn aŭ praloĝantojn, sed se ili

loĝas en Aŭstralio la aŭstralianoj deziras kaj uzas specialan vorton ("aborigeno", neologismo). Preskaŭ ĉiuj nacilingvaj vortaroj Esperantaj estas plenaj je tiaj balasteroj.

La plej multaj Esp-istoj uzas Esperanton kiel ludilon, ne serioze kiel fidindan komunikilon. Tiuj ĝenerale ne scias, ke en lingvo, en komunikado, oni ofte uzas vorton por nocio kiu enhavas ankaŭ flanksignifon ne esprimitan pro ĝenerala kompreno. Iomete kiel ĉe la Regulo pri Neceso kaj Sufiĉo. Ni faras tion daŭre. Se ni manĝas kaj trinkas je la sesa, ni diras ke ni vespermanĝas je la sesa, ne indikante la tamenan trinkadon. Se ni rigardis kaj aŭskultis teatraĵon, ni diras ke ni rigardis ĝin, ĉar la aŭskultado estas logika kunokazo. Se ni parolas pri la organizado de televido, ni parolas pri "la ŝtata televido", ĉar tio logike inkluzivas la teknikajn organizadojn. Estas pedante kaj nenature uzi specialajn, neologismajn, vortojn por tiaj kazoj ("edi", "spekti", "televizio", ktp), por kiaj nek eĉ la etnaj lingvoj uzas specialajn vortojn.

Balasto, balasto, balasto.

Marcelo Leereveld.

Aŭstralio.

En la artikolo "La Adverbo en Esperanto" en "Laŭte!" n-ro 107 aperis du seriozaj eraroj. Bonvolu korekti ilin. Paĝo 27 linio 10 elsube: "martelo" ŝanĝiĝu al "marteli". Paĝo 28 linioj 19-18 elsube: "neverbecaj" ŝanĝiĝu al "neadverbaj".

#### AL ĈIUJ REFORMEMULOJ !

Chu vi scias ke, sur la bazo de Esperanto, ĉirkaŭ 48 lingvoj (aldirite, 48 reformitaj formoj de Esperanto) estis faritaj ? Vidu kun kia sukceso ! Do, antaŭ ol proponi reformon, certighu, ke ĝi ne estis jam proponita.

En la sama libro (*Les fous du langage*, Marina Yaguelo), kie mi lernis tiun informon, estas menciita "reformita Esperanto" de Zamenhof mem, sen alia detalo ol la dato 1894. Chu iu povas doni detalojn pri tiu temo ?

Daniel PATOUX  
Valbelle  
F-07140 THINES

#### SEMAJNFINAJ STAĜOJ 1994

por lerni intense dum 2-3 tagoj

La 5an de februaro (ekde la 13a kaj 30) ĝis la 6a (je la 17a) en NANTES (Francio)

De la 21a de majo (je la 13a kaj 30) ĝis la 23a de majo (je la 17a) en LE POULIGUEN, apud LA BAULE (Francio)

Ekrilatu kun ESPERANTO 44  
Anita CORTES, 5 bis rue Appert  
F - 44100 NANTES. Tel. 40693243.

Diferenco inter plenkreskuloj kaj infanoj : la kosto de la ludiloj.



- grève sauvage ( une ) -> neoficiala ( nesankciita ) striko  
 1338 ( faire grise mine ) - ajouter : montri acidan ( malafablan ) mienon  
 1340 ( en gros ) - ajouter "grossomodo" + proksimume  
 1341 ( un gros bonnet ) - ajouter : moŝtulo  
 gros bras ( un ) : forta brako, fortikulo  
 1347 ( pop. : un gros plein de soupe ) - ajouter : dikventrulo  
 1349 ( en avoir gros sur le coeur ) - ajouter : ( pop. ) en avoir gros sur la patate  
 + havi grandan pezon sur la koro
- grosse tête ( avoir la ) : havi ŝvelan kapon  
 gros yeux à qqn ( faire les ) : skoldmieni al iu  
 guerre comme à la guerre ( à la ) : iel ajn estu !  
 1351 ( de guerre lasse ) : ajouter : rezignanta  
 1356 ( avoir la gueule de bois ) - ajouter : suferi postebriion  
 1360 ( les gueules noires ) - ajouter : la ( karbo ) ministaro  
 1363 ( à sa guise ) - après "bontrovo", ajouter "plaço"  
 habillé ( vêtu ) comme un prince : vestita kiel princo  
 1375 ( à la hâte ) - ajouter : en rapideco Z, preterkure  
 1377 ( n'avoir hâte que de ... ) - ajouter : strebi nur  
 1378 ( hâter le pas ) - après "hâter", ajouter : allonger + plirapidigi la paŝojn B  
 haut la main : senpene, facile  
 1382 ( de haute lutte ) - ajouter : perforte; ( fig. ) : post longa strebado  
 1383 ( avoir la haute main sur les affaires ) - ajouter : regi sur la negoco; ĉefdecidi  
 haute volée ( de ) : altranga  
 haut lieu ( en ) : altrange  
 haut vol ( de ) : altfluga  
 1387 ( en herbe ) - ajouter : ekkreskanta  
 1388 ( un hercule ) - ajouter : heraklo  
 1391 ( à l'heure du laitier ) - remplacer 2375 par 2374  
 1394 ( les heures de pointe ) - ajouter : la pinthoroj  
 histoire à dormir debout ( une ) : neverŝajna fabelo  
 histoire de fou ( une ) : freneza ( malsaĝa ) rakonto  
 1403 ( un homicide par imprudence ) - ajouter : senintenca mortigo  
 1405 ( un homme à femmes ) - ajouter : "un coureur de jupons" : jupĉasisto  
 homme à homme ( d' ) : senpere  
 1411 ( un homme de bien ) - ajouter : bonulo  
 homme de confiance ( l' ) : la konfidato  
 homme de couleur ( un ) : neblankulo  
 homme d'expérience ( un ) : spertulo  
 homme de l'art ( un ) : kuracisto  
 1416 ( l'homme de la rue ) - ajouter : la meza sociano, la averaĝulo  
 1417 ( un homme de lettres ) - ajouter : literaturisto

## LINGVAJ ANGULOJ

## ALIES

En la n-ro 107 de **Laŭte** interesis min la parentezo kun la unua alineo pri la opinio de Vilhelmo Lutermano koncerne la vorton "alies". Tiun ĉi starpunkton mi plene aprobas. Misformita estas la dirita vorto pro tio, ke arbitre kaj kontraŭ la ĝenerala uzado de nia lingvo unu el la du "i" (de **ali-** + **ies**) estas forlasita. Kompreneble, kiam tiu forlaso ne okazas, la objekto malaperas tial ke la kunmetado estas regula, ekzemple : **multial, kelkiuj** k.s. Same regula estas la formo **aliies** tiel, kiel la fundamenta "**aliula**".

Plej danĝera en tiu misformita serio estas la lokadverbo "**alie**" (anstataŭ la regula formo "**aliie**"). Prave atentigis René de Saussure en sia verko "**La logika bazo de vortfarado en Esperanto**" (fotorepresita de Artur E. Iltis, Saarbrücken 1984), ke tia radiko, kia "**ali-**", estas apriorie adjektiva. Adverbo senpere formata elde adjektiva radiko (**ali-**, **bel-grand-** ktp) esprimas manieron, neniam lokon aŭ tempon. El tiu ĉi gvidprincipo sekvas, ke "**alie**" ne povas signifi "**aliko**" sed nur "**alimaniere**".

Estas evidente, ke iu lingvo, en kiu ne eblus ĉe iu vorto decidi ĉu temas pri maniero aŭ pri loko estus nefidinda, ĉar danĝere malklara. Klara lingvo devas same bone utili por la ordinara uzado, la literaturo aŭ la kontraktoj. Elementa disciplino estas tial nepre postulenda de la lingvo-uzantoj. Tio memkompreneble tutsame valoras ankaŭ por ni esperantistoj.

André GILLES

## KOREKTA - KOREKTE

Maljuniĝante, mi iĝas maniplena tedulo. Sur la lingva tereno estas anguloj malhelaj, kiuj foje hirtigas miajn griziĝintajn harojn. Ĉu ĝuste pro tio mi povas aspekti "harfendema"?

La vortoj "KOREKTA - KOREKTE" troviĝas inter tiuj malhelaĵoj. Ĉar mi lernis esperanton ĉefe per konsultado al la Plena Vortaro, antaŭ ol transpreni la pli plenan PIV-on, mi provas ne forgesi ties rekomendojn.

Ĉe "KOREKTA", P.V. siatempe difinis nur jene : "**enhavanta neniun eraron aŭ difekton**" : korekta eldono, teksto, desegno, ktp.

Tiu konfuzigaĵo troviĝas ja ankaŭ en Grand Dictionnaire Esperanto-Français. Do, ne mirige, ke ĝi disvastiĝis prospere, eĉ ĉe la kompetenta Baronnet, kiu titolis iun el siaj gramatikaj komentoj : "Ĉu eblas korekte uzi **sia** ?" Tion mi korektis (en la eldono de la broŝuro "**Lingvaj anguloj**") al : "...ĝuste uzi **sia**".

Sed en PIV estas nun du difinoj :

1. **KOREKTA** : rilata al korektado : la korektaj reguloj de presejo, korekta domo (establejo, kie oni provas korekti kaj plibonigi junajn deliktulojn).

2. **KOREKTA** (evitinda) : laŭregula, ĝusta.

Intertempe Waringhien supozeble pentofaris...

Laŭ mia lingvosento la dua kazo estas ne nur evitinda, sed ja nepre evitenda ! Ĉar "**KOREKT**" estas verba radiko, **korekt-a** povas signifi logike nur : **rilata al korektado**. Se ne, oni falas en konfuzon. Ekzemple, kion povas signifi "korekta vestaĵo" ? Ĉu "deca, taŭga vestaĵo" aŭ ĉu "vestaĵo uzata por korekti, ekz. misformiĝon de la spino dum adolesko, aŭ sinkantajn mamojn" ?

Simile pri "**korekt-e**" :

En **Sennaciulo** (junio 93) troviĝas jeno : "Ĉiuj fakkunsidoj estis korekte vizitataj..." Kion tio signifas ? Ĉu ĝi estas francismo (aŭ germanismo) signifanta "**kontentige**" ? Verŝajne jes. Mi supozas, ke oni ne vizitis la kunvenojn por ion korekti tie !

Mi sugestas obei ankaŭ jenan konsilon de P.V. : Ne uzi "**korespondi**" kun la senco de "**respondi 3**" (esti proporcia, simetria je io). Tiu ĉi konsilo ne plu troviĝas en PIV, kiu preferis enkonduki la signifon nepre utilan en vojaĝoj per trajnoj, busoj kc. : "**la ŝipo korespondas kun la Pariza trajno**".

Ni interkonsentu por kune korekti niajn konfuzigajn lingvokutimojn kaj uzi esperanton kiel eble plej logike kaj ĝuste - ja ne "korekte" !

**Kribo**



## INTERBIRDA KOMUNIKIĜADO

(Laŭ Jean-Marie PELT)

Plejparto el la birdoj ŝatas kunesti kun samspecianoj. Kelkaj, krom dum la nestokonstrua periodo, preferas soleci : tiaj estas, i.a., la rabobirdoj, ardeo, kukolo, kaprimulgo, alci-ono.

La birdoj diversmaniere esprimiĝas : ili eligas voĉvokojn, uzas gestokodon, ludas per siaj plumaro kaj ornamaĵoj. Ili interŝanĝas mesaĝojn aŭ simbolojn. Krispohava tetrao febre flugilbatadas kaj aŭdigas tamburadon por diskonigi sian amordeziron, dum pega martelbatado estas ia senvoĉa birdokanto. Ili ne interkomunikiĝas pere de ia vortoprovizo ; pli ĝuste temas pri funkciado de denaskaj meĥanismoj.

Kial birdo kantas ? Kion tio signifas ? Oni distingu la veran kanton disde la vokoj kaj krioj. La vera kanto povus esti difinita kiel serio da konstante ripetigantaj sonoj laŭ specifa sinsekvo, ĝenerale eligata de la virbirdo, plejofte dum la naskotempo. Certaj kantoj estas tre melodijaj (turdo) ; aliaj tre malbelsonas kaj rememorigas pri intermita insektobruado. Sed preskaŭ ĉiam samas la signifo : virbirdoj elmontru sian teritorion por forigi la rivalojn kaj sian virseksan forton por allogi la femalojn. La prikantata de poetoj ĝoj- kaj amohimno fakte reduktiĝas al nur kruda rajtesprimo. Se aŭdigas dua virbirdo, pli laŭtiĝas la kanto de l'unua. Eĉ maldelikate pajloŝtopita birdo povas esti ekatakata des pli vigle, kiam sonregistraĵo informas pri ĝia ĉeesto. Tamen pasero - aŭ merlosilueto - ne emocias ruĝgorgulon, kiu interesiĝas nur pri siaj samspecianoj. Agresemo kaj kontraŭagresemo devigis la birdon perfektigi siajn plumaron kaj kantadon laŭlonge de la evolucio, por ke ĝi fariĝu tia lukse bela kreitaĵo de ni admirata.

En plejparto el la specioj agresiva konduto konsistigas preludon al la amorparado. La tutsole kantanta virbirdo unue strebas timigi la inbirdon, kiu lin kvietigas per milda konduto : ŝi flanketurnas la kapon, koketas, flugilbatas petante beknutradon, elmontras subiĝemon. La virbirdo ŝin tuj kontentigas. Tre oftas la amorcela beknutrado ĉe la kantistaj

birdoj, kies kantado plifirmigas la interseksajn ligojn dum la tre mallonga naskoperiodo. Tamen ekzistas kantoj neniel defendocelaj - ekzemple la aŭtuna fluŝtrado, milda dumvinttra plendokantado kaj ekstazaj melodioj de la kronohava turdo, la t.n. "emociaj kantoj".

Precipe matene aŭdiĝas la birdokantado. Tagmeze, eksilento. Birdon en usonaj arbaroj loĝantan oni kromnomis "la predikisto" pro la teda unutoneco de ĝia kanto (inter la matenkaj vesperkrepusko oni povis kalkuli 22 197 vokojn de ĝi).

Ĉu denaska la birdokanto? Birdoj for de siaj samspecianoj edukataj alprenas la kanton de sia specio. Do multaj birdoj ne bezonas lerni, nur ke la kanto ne estu tro aparta. Male najtingalo lernas de siaj antaŭnaskitoj, kvankam eĉ junaĝe ĝi havas sian propran ankoraŭ ne prilaboritan kanton. Imitaĵoj estas akiraĵoj.

Ene de la sama specio du unuopuloj kantas laŭ malsama maniero. Oni identigis 884 malsamajn kantojn ĉe kantistaj fringeloj en Usono. Aliflanke 462 registraĵoj pri unu kantista virfringelo liveris 13 temojn kun 187 malĉefaj variaĵoj. Tre etaj malsamaĵoj de nia orelo nepercepteblaj ebligas, ke la birdoj rekonu unu la alian kaj lokalizu la senteritoriajn fremdulojn. Sfenikso ene de plurcentmila kolonio scipovas rekonu la voĉon de la kunulino post plurmonata foresto.

Ĉiu birdospecio havas "vortoprovizon" koncerne la nutraĵon: kokino klukas; rubekolido silentas, kiam ĝi plensatas; poste ĝi re-ekpepas kaj ĝia voko ŝvelas ĝis dunaĵo (kio ebligas, ke la gepatroj ĝin lokalizu, se ĝi estas la neston forlasinta). Se arĝentkolora laro havas tro abundan manĝon, ĝi invitas la samspecianojn ĝin reatingi por profiti la okazon. Same pri papagoj kaj aliaj grenvoruloj. En la nordaj landoj de Eŭropo kaj Ameriko paruoj, pegoj kaj regoloj ofte ĉasadadas kunkune; similaj fenomenoj observeblas sub la tropikaj arbaroj.

Samspecianoj tre verŝajne rekonas la fundamentajn kriojn de alispecianoj: flug-ordonoj, haltigo, kuniĝo. Ne unuformaj estas la alarmkrioj: sciendas, ĉu minaco venas el la supro (rabobirdo) aŭ el la malsupro (homo, hundo, kato). Kokino alarmas pri rabobirdo per raŭka krio; rilate al homo ĝi kontentiĝas je klukado. Timoplana paruo akute pepadas; sed en ĉeesto de strigo longan plendon ĝi eligas. Per disaŭdigo de

surbendigita korvovoko pro ĉeesto de otuso, biologoj pruvis, ke en malpli ol ses minutoj estas eble arigi grakantan korvobandon. Inverse reproduktita alarmokrio pelis sturnojn el sia dormejo, kien ili revenis, nur kiam ili ekkonsciis pri la malvereco de la alarmo.

En la specioj, kie vir- kaj inbirdoj estas nedistingeblaj, necesas speciala rito (ekzemple la piedetoj de la inbirdo alprenas la rozan koloron, signon pri seksa ekscitigo, kiam ŝi atingas la nestan platformon). Okazas, ke en difinitaj specioj masklo kaj femalo plenumas veran afabloriton: la europaj cikonioj preskaŭ mutas, sed per bekklakado ili eligas kastanjetan bruon je kelkcento da metroj aŭdeblan. Kiam surnesta cikonio ekvidas sian kunul(in)on, ĝi tuj bekklakadas tirante la kapon malantaŭen, poste antaŭen. La partnero senmoviĝas, same agas kaj ili longe intersalutas. Same pri multaj akvobirdoj, eĉ ekster la naskotempo.

Jen strangaĵo: en Rokmontaro sur areno 800 metrojn longa kaj 200 metrojn larĝa kuniĝas 400 kikoj. Ĉiu dancas 10 metrojn malproksime de la ceteraj. Dum semajnoj jen seninterrompa sinsekvo de paradoj kaj bataloj ĝis la plej fortika masklo estos sian superecon elpruvinta. Batalfine ĉiuj femaloj venas por amori kun la supervenkinto kaj trairas la arenon ne persekutate de la malsukcesintoj. Oni observis kokan moŝton, kiu honoris 21 inojn en unu matendaŭro. Poste venas la "subkoko" kaj la gardistoj. Estas al ili permesite amori, kiam la estro estas superŝutata... Notindas, ke indiajn tribojn imitas la kokajn dancopaŝojn.

Se meĥanikaj montriĝas tre multaj birdaj gestoj, tamen ĉe neatenditaj cirkonstancoj la konfuzitaj subjektoj povas levpreni ligneron, kanti, glatigi siajn plumojn, samkiel konfuzita homo ekfajfas, ludas per la ŝlosiloj aŭ gratas al si la oreton.

Kiam oni tre fruaĝe edukas birdon de la normala medio disigitan, ĝi ekligiĝas kun sia bredisto (tiel kondukas anseroj). Eĉ tiu afekcia ligo povas koncerni ne homon, sed tut-simplan aĵon, kiel botelon aŭ skatolon...

Sed ruzoplana montriĝas minacata aŭ pelata birdo, kiam forflugo neblas: por defendi la ovojn aŭ idojn ĝi trompas la malamikon. Ĝi provas timon inspiri per laŭtega kantado; ĝi ŝajniĝas nerealan dikecon per plumoŝveligado - otusa kon-

duto) aŭ vunditan kruron por tiri la atenton de la malamiko kaj... fortiriĝi... La senbrilaj plumaroj de la femaloj kaj ido konsistigas oportunan kamuflilon.

Se kantado estas nur unu el la multnombraj birdaj esprimrimedoj, ties denaska lingvokodo, malsama ĉe ĉiu specio, per konstanta evoluado laŭlonge de la jarmiloj, signas iaspecan adaptiĝemon, do inteligentecon.

S. BONIOL.

## Flamgamo

*Flavruĝo, rustoflav', orbruno.  
Folioj flamas, flirtas, falas.  
Potence pompas ĉi aŭtuno :  
Flavruĝo, rustoflav', orbruno.  
Fandiĝas kupro de la suno  
Sur la ĉiel', dum nuboj balas.  
Flavruĝo, rustoflav', orbruno.  
Folioj flamas, flirtas, falas.*

S. BONIOL.

\*\*\*\*\*

## JUS APERIS

Ilustrita historio  
de la Laborista E-Movado

Eldonita de Fritz-Hüser Instituto, 116 paĝoj duone en la germana, duone en esperanto. Havebla ĉe A. Stephan, Carmenstr.5, DE 40549 Düsseldorf (10DM) aŭ ĉe SAT, Parizo (35 FF).

Salutinda estas tiu iniciato kun tiel belpromesa titolo ! Ja en la jardekoj antaŭ la dua mondmilito, kaj eĉ iom antaŭ la unua, floradis la laborista E-movado. Tiu broŝuro skizas ĉefe la koncernen germanan movadon, dediĉas kelkajn paĝojn (de U. Lins) al la E-istoj dum la hispana milito, malmulte pri SAT (nenio pri la periodo 1952-1987). Ĉu tio signifas, ke, efektive, estas nenio aparte menciinda en la kvar lastaj jardekoj ?

La broŝuro povas tamen utili al historiemiaj e-istoj, kiuj strebas arigi kromajn informojn, suplemente al la nesuperebla verkego de U. Lins "La danĝera lingvo". La recenzinto de tiu broŝuro en *Sennaciulo* de nov. 93 bedaŭras, ke ne estas disponebla la dokumento "Historio pri la skismo...". Nu, SAT-broŝurservo pretas represi ĝin. Alia manko : la historio de SAT de 1952 ĝis nun. La broŝuro de SAT-broŝurservo (1953-1981), kompilita ĉefe de la bedaŭrata N. Bartelmes, estas elĉerpita, kaj, se reeldono okazu, oni nepre profitu de la okazo, ĝisdatigante la kompilaĵon ĝis 1993.

Kribo.

## Vortoj

de

Maljunulo



EL MIA GALERIO DE PORTREROJ

- VII. "MIA FRATO" ROĜERO

Roĝero BOLZE ne havis fraton, ankaŭ mi ne. Li nomis min frato kaj reciproke.

Ni estis ok amikoj formantaj la "Societon Hektor - Gobeŝo" (S.H.G.), tiel nomita laŭ la kromnomoj de ĝiaj du iniciatintoj. Ĝia aktiveco konsistis el ĵaŭdaj kaj dimanĉaj ekskursoj tra la kamparo ĉirkaŭ ALESO. Nia plej longa ekskurso okazis en septembro 1916 : ekzakte 50 kilometrojn kun alsupro de monto Buket, pli alta je 400 metroj ol nia urbo. Je la reveno vespere la lastaj 15 kilometroj estis marŝitaj en precize du horoj. Ni estis nelacigeblaj. Eĉ mia kara amiko Marcelo BROUSSE, kiu estis malalta kaj maldika kaj aspektis nefortika ; fakte li estis fizike tre rezistanta kaj havis ŝtalan energion.

En novembro de la sama jaro Gobeŝo forlasis nin por reiri al sia naskiĝurbo San Stefano, kaj Johano ROMANET malsaniĝis kaj komencis sian kvarjaran kalvarian vojon al frua morto. Ni restis 6.

Mi havas grupan foton de tiuj ses. En ĝi elstaras Roĝero : alta statur, svelta korpo de atleto, blondaj haroj, vivaj ridemaj okuloj, pulpaj frandemaj lipoj. Li estis vigla, lerta, gaja, impeta, sentima. Li havis ĝustan kaj agrablan tenorvoĉon. Sufiĉe bona muzikisto, li komponis por la S.H.G. duvoĉan marŝokanton, kiun ni ĥore kantis en niaj ekskursoj. Ni fajfis la kvar unuajn notojn kiel retrovsignalon kiam ni estis dise izolitaj en arbaro.

Roĝero, iom pli aĝa ol mi, apartenis al la rekrutklaso de 1918. Li estis mobilizita jam en 1917 kaj tre baldaŭ sendita al la batalfronto. Li partoprenis en pluraj bataloj sen entuzi-

asmo, ĉar li estis, kiel mi, pacisto, kontraŭmilitisto. Ĉiusemajne mi sendis al li la gazeton "La Vague" (La ondo), socialista kaj pacista, ĉefredaktita de deputito Petro BRIZON.

"La Vague", faldita en leterkoverto, konsistigis sufiĉe dikajn paketon, kiu povis vekti la atenton de la cenzuristoj. Tamen Roĝero ĉiam akurate ricevis ĝin. Li sendis al mi la bulleton de la armeoj de la Respubliko, patriota propagandilo, en kiu li ĉirkaŭstrekis la plej stultajn frazojn aŭ alineojn, kaj ili estis multaj.

BRIZON estis unu el la tri francaj "pilgrimintoj" al Kienthal. En tiu svisa urbeto kunvenis delegitoj de pacistaj organizoj el ĉiuj militantaj landoj. Sub prezido de LENIN, ĝi voĉdonis kontraŭmilitan rezolucion, kiu postulis tujan pacon sen aneksado kaj sen monŝuldo. Sur la orienta fronto TROCKI baldaŭ subskribis pac-kontrakton, cetere la rusaj soldatoj rifuzis plu batali. En Francio la milito plu daŭris ĝis novembro 1918.

Tiam Roĝero revenis feliĉe nevundita kaj sana. Li tuj iris al Nimo, en la Normala (Instruista) Lernejo. Ni, la kvin aliaj, iris al Aikso-la-Provenca, en la lernejo pri Artoj kaj Metioj. Ĉiuj ferioj rekunigis nin en Aleso, kie ni tuj vizitis amikon Johano ROMANET, kiu ĉiam pli kaj pli malfortiĝis. Li mortis en la Paska ferio de 1920, dudekjara.

En 1921 Roĝero estis nomita instruisto en Nimo, kaj ni la 5 diplomitaj inĝenieroj estis rekrutitaj en Versajlo. Post nia militservo ni dise foriris al diversaj direktoj.

Unu fojon en Aleso mi hazarde renkontis Roĝeron promenanta kun edzino kaj du infanoj. Dum kelkaj minutoj ni retrovis inter ni la fratecan etoson. Kaj denove la vivo nin disigis.

Roĝero restis en Nimo, dum ni migradis tra metioj kaj tra regionoj, de fervojo al kinotekniko, al optiko, al pneŭmatikoj, al dika mekaniko, fine al la turbo-maŝinoj; de Rejnlando al Parizo, al Clermont-Ferrand, al Aleso, al Persan-ĉe-Uazo kaj fine al Pireneoj. Kiam mi emeritiĝis en 1965 mi loĝis en Paŭo. Mi kun bedaŭro forlasis tiun ĉarman agrablan urbon por veni al Nimo, pli proksima de Florako. Komprenoble Roĝero ne povis tion diveni, sed mi devus memori, ke li estis Nimano kaj serĉi lin. Estis facile. Mi konfesas, ke mi eĉ ne pensis pri tio.

En 1968, parolante kun emerita instruisto, mi demandis ĉu li konis BOLZE.

- Jes, li faris sian tutan instruistan karieron en Nimo, kaj finis kiel lernejestro. Kiam li emeritiĝis, li restis tie ĉi, kie li estis vicurbestro kun la socialista urbestro Huberto Rouger. Li estis tre agrabla kolego kaj bonega kamarado.

- Vi diras "estis". Ĉu do...

- Jes, li mortis en la lasta jaro.

- En 1967 ! Do dum du jaroj ni vivis en la sama urbo, kaj ne sciis pro mia kulpo. Ni povus dum du jaroj revivi nian fratecon. Tro malfrue !

Mi amare riproĉas al mi mian kulpan neglektemon. Plurfoje en mia vivo mi spertis similajn bedaŭrojn kaj konscienci-proĉojn. Neniam tiom akre, tiom dolore.

Pasis 26 jaroj de post lia morto. Mi imagas liajn ostojn en ĉerko en unu el la du grandaj tombejoj de Nimo : la katolika, la protestanta. Mi ne scias, en kiu religio li estis baptita kaj tiu demando neniam interesis min, ĉar li estis ateisto kiel mi. Pri preskaŭ ĉio ni ambaŭ estis samideanoj. Tamen, li ne estis esperantisto. Eble, se ni estus restintaj samurbanoj, mi estus varbinta lin. Tiam estis en Nimo malmultopa sed vigla grupo kun Doktoro SALAN, siatempe komunisto. Roĝero, kiel mi, ne estis logita de la marksismo-leninismo, sed ni povis simpatie rilati kun sinceraj komunistoj.

26 jaroj kaj mi daŭrigas mian senutilan ekzistadon de blinda maljunegulo. Mi provas imagi lian skeleton, sed en mia kormemoro, samkiel en la foto, li restas la ĉarma adoleskanto, la gaja kompano de mia juneco.

Roĝero, neniam plu okazos al ni interrenkonto. Neniam plu mia Roĝero, frato mia !

Neniam plu...

P.S. Post la portreto de Johano Romanet, mortinta 20-jara, mi diris, ke mi ne faros portretojn de miaj aliaj amikoj. Tamen mi faris escepton pri Roĝero BOLZE.

Demandoj kun respondoj  
kaj demandoj sen respondoj

La Golfa milito finiĝis tre rapide per efika interveno de potencaj okcidentaj armeoj. Nun la milito en Bosnio eterniĝas. Kial tiu diferenco ? Ĉu vi ne flaras petrolan odoron ? Efek-

tive en Kovejto estas petrolo, en Bosnio ne.

Tamen tiu simpla konstato eble ne sufiĉas por klarigi la diferencon.

En la Golfaj militoj la Iraka armeo estis pelita ĝis sia landlimo kaj la okcidentaj armeoj haltis tie. Ili tamen povus invadi Irakon kaj eble estigi revolucion en Bagdado. Sed tiu revolucio povus esti islamista. Eble la okcidentanoj preferas rilati kun la inteligenta diktatoro Sadam Hussein ol kun fanatikaj ajatolaoj.

En Jugoslavio, se Bosnio estos fine venkita de la serba kaj kroata armeoj, kio okazos en Sarajevo? Oni scias, ke moderaj muzulmanaj regnoj, se ilia reĝimo ne estas sufiĉe forta, estas en konstanta danĝero pri islamista revolucio.

Kiuj ŝakludon do ludas la okcidentaj diplomatoj malproksime de la batalkampoj? Mi konfesas, ke mi ne estas sufiĉe inteligenta por kompreni tiun komplikitan kaj subtilan ludon. Mi nur konstatas, ke ĉiutage falas kelkaj vunditoj kaj kelkaj mortigitoj.

Kial?

**Kompatinda homaro! Kiel malrapide ĝi progresas!**

**VALO**


En novembro amiko VALO sendigis jenan mesaĝon al la red. de **Laŭte**:

"...Ankaŭ la "Vortoj de Maljunulo" maljuniĝis. Eble tiu rubriko, kiu komenciĝis antaŭ pluraj jaroj, laciĝas kaj iĝas teda. Se estus tiel, kaj kvankam mi havas en la kapo ankoraŭ kelkajn temojn, mi tuj ĉesigus ĝin. Diru al mi sincere kion vi opinias pri tio. Mi estus nek ofendita nek ĉagrenita. Mi restos fidela leganto\* de **Laŭte** kaj mi volonte legos "Vortojn de JUNULO aŭ JUNULINO, aŭ GEJUNULOJ". Tiu nova rubriko probable estus bonvena kaj bona..."

La demandon de VALO mi tute sincere respondas. Al mi estas ĉiam granda plezuro legi kaj tajpi tiun rubrikon. Sed mi fakte preferus, ke ĝi nomiĝu tutsimple: "Vortoj de VALO". Ĉar, kial apartigi maljunulojn disde junuloj, aŭ inverse ??? Ankaŭ de aliaj laŭtuloj ĝis nun alvenis nur laŭdoj. Kion do opinias vi, gelegantoj?

\* Efektive, al nia blinda amiko nian gazeton **laŭte** legas amiko Andreo GENTE, loĝanta en AVIGNON. Kompreneble, Andreo ankaŭ transskribas la artikolojn diktatajn de VALO.

Kristiano.



**ĉies voĉo**

## SOJLE DE NOVA PERIODO EN LA MEZORIENTO

Reage al mia artikolo "La 'israela agresemo' - ĉu realo aŭ mito?" (**Laŭte**, n-ro 106) venis respondo el plumo de Nicolas Gil; la titolon mi preferas ne citi: mia bonedukiteco detenas min (la stilo atestas pri la homo...).

Pli facilas detrui atomon, ol antaŭjuĝojn - diradis Einstein. S-ano Gil estas laŭŝajne tiel katenita al ili, ke ĉiuspeca argumentado kun li restus vana fortostreĉo. Aliflanke la koncerna skribaĵo necesigas reagon, favore al neinicitaj legantoj de "**Laŭte**" rilate Israelon, la judan popolon, kaj ties nacian liberigan movadon, la cionismon.

Jam antaŭ la periodo de la Holokaŭsto, diversspecaj antisemitaj kamufladis sian judofobion per sloganoj: "ni malamas nur plutokratojn, framasonojn, revoluciulojn, kosmopolitojn, ktp - kondiĉe ke ili apartenas al la juda gento ("raso" laŭ ilia ŝatata difino)". Venis la malhelaj tempoj, kaj evidentigis tio, kion jam ĉiu klarvida homo sciis, ke la kavaliroj de l' malamo celis senescepte ĉiun judon, sendepende de ilia aparteno al tiu aŭ alia kategorio, de morala valoro, produktiveco, ktp. Eĉ niatage, la "skinheads" (razitkapuloj) kaj alispecaj novnazioj, konsciante pri la fakto, ke post Aŭŝvico ĉiu antisemito atestas pri si, ke li estas potenciala murdisto, kamuflas sian zoologian malamon per la eufemismo "kontraucionismo"; tiu sonas kvazaŭ iom pli dece...

Tiaspeca naŭze fripona komparo de cionismo - humaneca aspiro rekolekti kaj krei nacian hejmon al kruele persekutita popolo en ilia antikva hejmlando - kun la plej abomena ideologio ekzistinta iam en la homa historio - ne meritas reagon. Bonvolu iuj el la legantoj trarigardi la verkojn de la ideologoj de la politika cionismo (Teodoro Herzl, Ber Borohov, Moses Hess k.a.) kaj trovi spuron de eĉ la plej eta aludo pri ajnaspeca malamo al "malsamuloj".

Nekontesteble, la hitleranoj murdis amason da diversgentanoj, kaj planis sklavigon aŭ ekstermon de ĉiuj neĝermanaj,

respektive ne-arjanaj popoloj ; tamen la sistema ekstermadpolitiko al judoj (kaj ciganoj, same dissemita, senpatria gento!) estis unika fenomeno, nekomparebla al subpremo de aligentanoj ; ĉiu judo loĝanta en la regad-sfero de la nazioj estis automate kondamnita al morto. Du trionoj el la eŭropa judaro pereis, kaj nur la - tro malfrua! - kolapso de la Tria Regno savis la restintan trionon.

Jes ja, dum la brita mandat-periodo en Palestino ekzistis du malgrandaj judaj teror-organizoj : Ecel kaj Lefi. La granda plimulto oponis kaj kondamnis ilian agadon ; tamen eĉ tiuj organizoj atakis nur policistojn, agentojn de la sekreta servo, altgradajn funkciulojn, sed neniam iliajn familianojn.

En Libano, fakte pupet-ŝtato de Sirio, la registaro ne kapablas aŭ ne volas malarmi la diversajn armitajn miliciojn ; la plej ekstremisma el ili, inspirita kaj subtenata de la iranaj teokrataj fanatikuloj, celas malebligi la pacan kunvivadon de la loĝantoj de Galileo (Norda Israelo) ; israelaj defendarmeanoj patroladas tie ĝuste por bremsi tiajn agadojn de la terororganizoj "Ĥizballah".

Neniu supozu, ke nia publika opinio aŭ registaro estas feliĉaj pro perdo de homvivoj inter la palestinanoj, precipe se temas pri senkulpaj civitanoj senarmitaj. Sed la "herooj" de la "Intifada" (insurekcio) ofte kaŝis sin malantaŭ la dorso de infanoj, kiujn ili trejnigis kaj incitis ŝtonĵeti sur israelajn soldatojn. Kaj se - sub hajlo de ŝtonoj - venis reago, okazis bedaŭrinde, ke geknaboj vundigis aŭ eĉ perdis la vivon.

N. Gil pridubas la pacemon de Israelo ; sed la ĵus okazintaj eventoj elokvente konfirmas mian aserton : La registaro gvidata de Rabin (ĉefo de la Laborista Partio) ne nur predikas, sed antaŭ la okuloj de la tuta mondo manifestis sian pac-aspiron, manpremante kun la estro de la palestinanoj, kaj espereble tre baldaŭ kun tiuj de Jordanio, Sirio kaj Libano. Jam ne foras la tempo, kiam realiĝos "por eterna ben' " la antaŭdiro de nia profeto Jesaja : "Kaj ili (la nacioj) forĝos el siaj glavoj plugilojn, kaj el siaj lancoj rikoltojn ; ne levos nacio glavon kontraŭ nacio, kaj oni ne plu lernos militon".

**Teddy Löwenkopf** (Kibuco Maagan)

## EKLEZIO(J)...

(vidu L!107, p.35)

En L!107-a, Jacqueline LEPEIX petas klarigon pri mia plurala uzo en la vorto "eklezio(j)" en la diskuto pri demografio. Mi ne estas specialisto, eble tiu "j" falis tute hazarde el mia plumo ; pri la protestantoj, ekzemple, mi ne riskos paroli, ĉar ili estas tiom multe da specioj, ke neblas ion precizan diri ; mi tamen kredas, ke ĝenerale ili konsentas pri kontraŭkoncipiloj, sed ne ĉiuj pri kontraŭnaskiloj. Sed mi tamen provos ĉi-poste, laŭ mia povo, porti iom da greno al la Ĵakelina muelilo...

La tri religioj, kiuj sekvas la instruojn de la Biblio, memoras, ke estas dirite en la Genezo (ĉap.8-a, 15,16,17) : "Kaj Dio diris al Noa jene : ... Vi kaj via edzino, kaj viaj filoj, kaj la edzinoj de viaj filoj kune kun vi ; ĉiujn bestojn kiuj estas kun vi... elirigu (el la arkeo) kune kun vi, kaj ili moviĝu sur la tero kaj fruktu kaj multiĝu sur la tero." Ŝajne laŭ tiu teksto, ne estu limigo al hommultiĝo.

Tiam la islamanoj rajtas havi 4 edzinojn plus eventuale sklavinton, ĉar ili rimarkis ke virino kapablas naski nur unufoje jare, dum viro estas multmulte pli ofte "sempova". Tial en la islamaj partoj de nigrula Afriko, oni trovas virojn kun 20 infanoj : tial tiuj popoloj estis tute nekapablaj elpensi la briĝludon, kiu limigas la partoprenantojn al 4 personoj en normala ludo kaj 8 en konkurso, tial ili restis sovaĝaj!... Se nun ni prenas la Koranon en ĉapitro "La lumo" §59a ; "La aĝaj virinoj NE KAPABLAJ EDZINIĜI rajtos formeti siajn vualojn", kio pravas ke por Islamo, edziniĝo signifas naskadon. Plie ĉapitro "La kompatema" §58 kaj 59 : "Kion vi opinias ? Kiam la viro alproksimiĝas la virinon, ĉu estas li aŭ Dio, kiu donas la estadon al nova kreitaĵo?" : tiu teksto estas certe kontraŭ kontraŭnaskaj rimedoj, ĉar Dio mem intervenas ; sed eble ne kontraŭ antikoncipaj rimedoj... Nun ĉapitro "La repudion" §4a : "atendu 3 monatojn antaŭ ol repudii la virinojn (senfruktajn), konservu la naskontajn", kio pravas ke por la Korano oni geedziĝas nur por havi infanojn, kaj tio estas konsilinda, laŭ ĉapitro "La defendo" §1 : "Ho profeto, kial vi ne uzas la ĝuojn kiujn la ĉielo disponigis al vi ? Vi volas plaĉi al viaj edzinoj : la Eternulo estas indulgema kaj kompatema".

La bramanaj hindoj retenas sian semon, ĉar ili pensas, ke tiu elŝpruco riskus mensoperdon. Ŝajne la aliaj kastoj ne ha-

vaŝ tian antaŭzorgon...

Ĉe la nigruloj : foje la religio "demokratio" instigas ilin al tronaskado. Ili fakte ne voĉdonas, kiel ni kredas, por ideoj aŭ opinioj, sed por samtribanoj ; do, por la plejbono de la tribu oni ĝoje multiĝu !!!

Pri la Ĉinoj, la ideogramo "feliĉo" konsistas el virinideogramo + filo ; tiu restos en la domo kaj transdonos la familinomon. Tamen, tre ofte estas la patra avino kiu regas en la domo ; krome, la Ĉinoj havas grandan konsideron por belaj virinoj, kiel la imperiestro-amantino JANG KWEJ FEJ. Ili havis ankaŭ imperiestrinojn, se ne paroli pri la terura imperiestro-patrino CŬ HI. Cetere, kun sia koncepto pri JANG (vira ento) kaj JIN (ina ento), ili filozofie metas samnivele virojn kaj virinojn, ne kiel nia katolika mezepoka ekleziularo, kiu sin demandis ĉu fakte ankaŭ la virinoj havas animon? Sed nek ĉe ili nek en budhismo mi trovis ion kiu instigus al homplimultiĝo. Sed sur la ĉina kamparo, ĉar ĉio estis mane farita, oni kutimis havi multnombrajn infanojn, sed ne pro religio, aŭ filozofio, kiu laŭ mia scio pri tio ne parolas.

Ĉe la Japanoj, la naskolimigo estas malnova pro manko de spaco kaj grundo. La filinoj estis ĝenerale ne bonvenaj, tiom ke antaŭ ne tre longe, oni lasis ĵusnaskitinojn morti sur kampoj, aŭ oni vendis ilin. Ŝajne la situacio iom pliboniĝis, sed ankoraŭ antaŭ 30 jaroj ilia sorto ne estis tre enviinda : tiam multaj japanaj bonklasaj virinoj vojaĝis al Eŭropo por trovi edzon... Tiel unu el miaj amikoj el orienta Franclando edziĝis al Japanino ; preskaŭ samtempe ni akceptis Japaninon hejme ; ŝi estis ĵurnalistino kaj laboris por AHASI SHINBUM. Ŝi vizitis Eŭropon kaj fine edziniĝis kun germana samideano...

J. MANCEAU.

## PRI LA ATEISTA INSULTRITO

*Mi vere ĝojas, ke nek Edmundo nek Ledon estas kristanoj. Se ilia klereco pri ateismo estas tiom primitiva, kiom ilia klereco pri kristanismo, mi povas nur kompati al la ateistoj, ke ili havas tiajn kunulojn.*

*Laŭ la kristanaj mistikuloj, la paradizo konsistas el tio, ke oni vidas Dion, kaj la infero konsistas el lia tuta foresto. Do ne temas pri la fama sistemo de la karoto kaj la bastono, pri kiu parolas Edmundo. Se homo amas Dion, estas ja kompreneble, ke li volas eterne ĝui lian ĉeeston. Sed en la krist-*

*ana tradicio, la amo al Dio ne estas distingebla de la amo al homoj. Do kristano helpas al siaj kunhomoj pro la sama natura solidaremo, kiel ateista bonulo, kaj tiu amo al siaj kunhomoj ebligas al li pli bone koni Dion, kio instigas lin deziri eterne vidi Dion.*

*Mi bone komprenas la diferencon inter almozo kaj solidariĝo, sed laŭ mi malprave Ledon supozas, ke ĝi identas kun la diferenco inter religiemuloj kaj nereligiemuloj. Laŭ mi :*

- *kiam ateisto donacas 100 F al asocio por esplorado de kancero, tio estas almozo.*
- *kiam katoliko, enla kadro de iu laika neregistara organizaĵo, dediĉas 2 jarojn de sia vivo al la disvolvado de iu lando en la Tria Mondo, tio estas solidareco.*

*Mi tute ne vidas, ke nur katoliko povas doni 100 F por lukti kontraŭ la kancero, kaj mi ankaŭ ne vidas, ke ĉiuj, kiuj kontribuas al evoluado, estas ateistoj. Kion mi vidas kiel sekretario de iu grupo de Amnestio Internacia, tio estas, ke religiemuloj kaj nereligiemuloj kune aktivas por la rajto de ĉiu individuo esprimi, kion li kredas aŭ opinias. Ne pri ĉiu membro de mia grupo mi scias, ĉu li aŭ ŝi kredas Dion aŭ ne, ĉar tio ne ludas rolon en la aktivado de la grupo, kaj tion mi kutime ekscias post iom da tempo, kiam longa kunaktivado instigas miajn ĝekamaradojn paroli ankaŭ pri siaj propraj privataj vivoj.*

*Mi pasigis mian infanaĝon en urbo regata de komunistoj, en kiu ĉio ekzistis duoble : estis la korbopilka teamo de la katolikoj, kaj tiu de la urbo ; la infanferiejo de la paroko kaj tiu de la municipo ktp, ktp. Tia divido estas kutima en Francio, kaj mi ĝin ege bedaŭras. Tial mi preferas esti en Amnestio Internacia, ol en ACAT (kristana asocio por la abolicio de la torturo). Fakte mi fuĝis el ACAT al Amnestio Internacia, kiam la strasburgaj ACAT-anoj komencis cerbumadi, kiaj estas la specife kristanaj motivoj kontraŭi torturon.*

*La modelo pri karitato (la vorto poste tute degeneris), kiun proponas la evangelio, estas ĝuste tiu de homo, kiu ne havas la ĝustan kredon (samariano), sed pro natura kompatemo helpas al nekonata vundito, kiun li hazarde trovas sur sia vojo. Eble la pastro kaj la levido de la parabolo iris cerbumadi, kiaj estis la specife judaj motivoj, kiujn ili havas por kompati al viktimoj de surŝoseaj agresoj.*



Bedaŭrinde, en Francio (kaj eble aliloke), la vorto "laika" havas du signifojn :

- foje tio signifas, ke la laika asocio kuniĝas ĉiajn homojn, kiuj volas kune aktivi por iu celo. Tio estas la kazo de Amnestio Internacia, kiu estas vere laika asocio ;
- foje tio signifas, ke la laika asocio celas aktive propagandi ateismon.

Ne ĉiam eblas scii, kia estas la "laika" asocio, al kiu oni aliĝis. Ekzemple, se kristano aliĝas al iu laika asocio, kies celo estas disvastigi Esperanton, kaj konstatas, ke ĝia estraro sisteme nomas modelaj la membrojn, kiuj propagandas ateismon, kaj sisteme malfidas la kristanajn membrojn, kiuj ne volas silenti pri sia religia aparteno, estas ja normale, ke tiu kristano ne sentas sin hejme. Tial multaj kristanoj bedaŭrinde preferas aktivi en oficiale kristanaj asocioj.

Mi povas nur bedaŭri, ke kelkaj laŭtuloj volas plifortigi tiun emon, inventante diferencojn inter ateistoj kaj kristanoj, kiuj fakte ne ekzistas en la realo.

Jacqueline Lépeix.

## SEKSO ĈIE

Sur la paĝoj de **Laŭte!** atente kaj kortuŝite mi legis, kion samideanino Jacqueline Lépeix rakontis pri la seksa perforto, kiun ŝi suferis, kiam ŝi estis 13-jara.

Kaj estis tio, kio donis al mi motivon por redakti tion sekvantan.

Post malsato, sekso estas la plej forta el la impulsoj en la homo. Kiam homo "varmiĝas", oni povas diri, ke li perdas konscion pri bono kaj malbono. Li volas "deŝarĝi" tion. Nur post kiam li (aŭ ŝi) faris tiun "deŝarĝon", li (aŭ ŝi) rekonŝiĝas, sed jam la afero estas farita.

Je la horo de la amoro la plej alta princino, same kiel la plej naiva paŝtistino, la plej eminenta intelektulo, same kiel la plej simpla manlaboristo, transformiĝas en bestojn kaj ili montras tion, kion ili kaŝas al la okuloj de la mondo. Tio ĉi plej klare al io ajn montras al ni nian bestecan bazon.

Ho, sekso, sekso, kiel vi senmaskigas la homojn !!!

Ni, homoj, pasigas tri kvaronojn de nia vivo katenitaj de tiu senkompata "tirano" nomata sekso. Laŭŝajne ĝi estas fonto de plezuro ; tamen, se oni profunde pensas, sekso estas radiko de la plej granda sklaveco.

Kaj nun mi rakontos al vi ion, kio vere okazis kaj montras, ke la forto de la sekso ne konas limojn.

Antaŭ sufiĉe da jaroj, inter 1922-a kaj 1924-a, kiam mi estis knabo, mi loĝis kun miaj gepatroj en Hispanio, en vilaĝeto perdita inter montoj. Tie la vivo estis simpla. Oni povas diri, ke tie oni vivadis kiel en la mezepoko. La tuta vivo iris ĉirkaŭ la preĝejo (romkatolika, kompreneble). Estis la paroĥestro, kiu enskribis naskiĝojn, mortojn, geedziĝojn k.c.

Dimanĉe, post la meso, de la prediĝo li donis la sciigojn al la vilaĝanoj, ĉar multaj el ili sciis nek legi nek skribi ; rilate al la virinoj, ĉiuj estis analfabetoj.

Certe vi scias, ke romkatolikaj pastroj devas resti fraŭloj kaj virgaj. Tamen tio, kion mi rakontos, okazis en tiu vilaĝeto perdita inter montoj, en Hispanio, kiu estas la lando, kiu havas plej da preĝejoj en kvadrata kilometro da teritorio. Ĝin sekvas Portugalio kaj Italio.

Nu, la paroĥestro de la tiea preĝejo havis seksajn rilatojn kun unu el la paroĥaninoj. Ŝi iĝis graveda, kaj kiam la akuŝo alproksimiĝis, la kulpulo sendis la akuŝontinon al la urbo por eviti la skandalon. Sed volis la bona Dio, ke ŝi ne atingis la urbon, ĉar la bebeto venis en la mondon antaŭtempe...

La skandalo eksplodis. Tiam unu el la amikoj de la kulpulo diris al li :

- Mi ne povas kompreni kiel vi, tre bona kaj pia homo, povis fari tion.

Kaj jen la respondo de la paroĥestro :

- La erektiĝinta penis ne kredas je Dio.

A. Lopez Luna.

**KOMUNIKO DE AMIKECA RETO. Aŭtuno 1993.**

(Pardonu, ke ĝi tiel malfrue aperas en L! kaj urĝe plenumu la ĝisdatigon!)

La membroj de **Amikeca Reto** nepre devas re-aligiĝi por pluesti en la gvidlibro. Oni prefere uzu la oficialan re-aligiĝilon (kiun oni trovu en la libro), aŭ oni simple sendu la modifojn antaŭ la 1-a de decembro 1993 al :

**AMIKECA RETO, 88 rue Victor Hugo, F- 37400 AMBOISE.**

Kompreneble, INFORMOJN kaj ALIGILOJN oni petu je la sama adreso (aldonu 1 IRK).



## Parto el la skribaĵo de JACQUELINE

- Laŭte! 107 -

sugestas al mi jenajn rimarkigojn :

Ĉiu homo bezonas, aspiras amon de aliulo, fratan amon, kiun malofte oni renkontas en sia vivo. Konsideri ĉiujn homojn kvazaŭ gefratojn ; strebi al pliboniĝo de la homaro ; aspiri al Justeco, Egaleco, Frateco, paco k.s., tian idealon celas aliaj homoj ol la kredantoj... SAT-anoj kaj liberpensuloj inkluzivitaj ; eĉ tiuj ĉi-lastaj havis(as) siajn martirojn.

Mi ĝuas la fratecan etoson, kiu regas en SAT-medio.

Jacqueline estas polemikema kaj pro tio provokema : "ke ateistoj havas strangan riton : ili bezonas regule insulti alipensantojn". La ateistoj, liberpensuloj, havas nek riton nek dogmon. Eble okazis, ke iuj liberpensuloj malĝentile debatis kun ŝi... Tio okazas en ĉiaj interhomaj rilatoj ; tio estas individua reago. Laŭ mia scio, kiam ni debatis tiun temon en Laŭte, ne malĝentile oni traktis ĝin... sed, eble, iuj trovas insultaj trafajn argumentojn.

Al vi, kiu parolis pri insultoj, mi demandas kion vi opini- as pri tiu frazo via : "Kiam tiun riton pie plenumas gestultuloj, tio min ne ĝenas, kvankam povus esti pli inteligente uzi mian kotizon". Vi skribis : "Kiam maljuna amiko, kiun mi estimas, kredas sin devigita plenumi tiun riton, tio min ĉagrenas". Liberpensuloj povas rebati tion al vi, kaj, same, ĉagreniĝi pro via kredo.

En la koro de multaj homoj, eĉ liberpensantoj, kiam ili estas kore vunditaj, restas spuroj. Pli ol al vi tio okazas...

Jen anekdota ekzemplo : en Hérrouville, dum la kongreso okazis kunveno de la liberpensuloj. Kiam mi eniris en la koncernan ĉambron, tri kongresaninoj provis traduki... la Preĝon. Oni petis mian helpon - mi estis la unua alveninto. Poste amiko Yves Peyraut afable respondis gramatikan demandon. Poste, tiuj personoj diris al mi, ke ni estis afablaj kontraŭ ili. Verŝajne ili supozis, ke afablaj interrilatoj estas neblaj kun liberpensuloj.

Mi demandas vin, kial vi partoprenas en SAT-renkontiĝoj? Ĉu pro masofismo aŭ por ŝajni martiron ? Tio ĉi estas nek ironiaĵo nek malamikaĵo. Mi skribas tion ĉi nek por polemiki nek por provoki. Mi nur ĉagreniĝas...

Koncerne la Golf-militon, mi tiom suferis kiel vi. Mi eĉ manifestaciis en Albiĝo, distanca je 80 km de Labastide.

Suzanne.

Nia felietono :

FRAGMENTOJ DE NEKONATA INSTRUO  
de Petro USPENSKO (OUSPENSKY)  
(resumpecoj)

14

KONSCIO DE LA MATERIO - ĜIAJ GRADOJ DE INTELIGENTO  
(El la 16<sup>a</sup> ĉapitro)

La rapideco de vibradoj de materio montras ĝian gradon de inteligento.

Estas nenio senanima aŭ mortinta en la naturo. Ĉiu aĵo estas vivanta, inteligenta kaj konscia laŭ sia maniero, sed ĉi tiu inteligento kaj konscio manifestiĝas laŭ la diversaj niveloj de esto, laŭ malsamaj skaloj.

La Tabelo de Hidrogenoj, kiu taŭgas por determini la densecon de materio kaj la rapidecon de vibradoj, samtempe taŭgas por determini la gradojn de inteligento k de konscio, kiuj respondas al la grado de frekvenco de rapideco de vibradoj.

Kiam la materio estas pli densa, la rapideco de vibradoj estas malpli alta kaj la konscio kaj la inteligento estas malpli grandaj.

Kiam la materio estas malpli densa, la frekvenco de vibradoj estas pli alta kaj la konscio kaj inteligento pli grandaj.

Ĉi tio signifas ke determinante la densecon de materio, ni determinas ankaŭ ĝian gradon de inteligento.

En ĉiu vivanta kreaĵo, en ĉiu materio estas difinita Hidrogeno kiu estas ĝia Centro de Gravito, nome, la averaĝa H de ĉiuj Hidrogenoj, kiuj konsistigas ĝin. Por trovi ĉi tiun averaĝan Hidrogenon, necesas koni la nivelon de esto de la kreaĵo kiu estas determinita de la nombro de etaĝoj de ĝia maŝino.

EKZ.: Homo estas strukturo el 3 etaĝoj.

Superaj bestoj havas 2 etaĝojn.

Malsuperaj bestoj havas nur 1 etaĝon.

HOMO



ŜAFO



VERMO



Homo estas 3-etaĝa; Ŝafo estas 2-etaĝa k vermo: 1-etaĝa.

La meza kaj malsupera etaĝoj de homo ekvivalentas -iel- tiujn de ŝafo; lia malsupera etaĝo, izole konsiderata, respondas al tiu de vermo. Sekve, ni rajtas diri ke la homo konsistas el homo, ŝafo kaj vermo; kaj ke ŝafo konsistas el ŝafo kaj vermo.

La homo estas kompleksa kreaĵo: lia nivelo de esto estas determinita de la nivelo de esto de la kreaĵoj, kiuj konsistigas lin.

La vermo ludas la ĉefan rolon en la homo 1.

La ŝafo ludas la ĉefan rolon en la homo 2.

La homo ludas la ĉefan rolon en la homo 3.

Sed ĉi tiuj difinoj validas nur por individuaj kazoj. Ĝenerale la homo estas determinita de la centro de gravito de la meza etaĝo. La centro de gravito de la meza etaĝo de l'homo estas H 96. La inteligento de H96 determinas la averaĝan inteligenton de l' homo, nome, de ĝia fizika korpo.

La centro de gravito de la 2<sup>a</sup> korpo (astrala) estos: H 48; tiu de la 3<sup>a</sup> korpo (mensa) estos H 24, kaj tiu de la 4<sup>a</sup> korpo (kaŭza) estos H 12.

DIAGRAMO DE LA 4 KORPOJ DE L' HOMO (kiu indikas la averaĝajn Hidrogenojn.)

4 KORPOJ:	FIZIKA	ASTRALA	MENSA	KAŬZA:	SUB-
(HOMO)	48	24	12	6	LEĜOJ
(ŜAFO)	96	48	24	12	← AVERAĜAJ HIDROGENOJ
(VERMO)	192	96	48	24	-

KLASIFO DE ĈIUJ KREAĴOJ AŬ VIVANTAJ ESTAĴOJ SURBAZE DE 3 KOSMAJ TRAJTOJ.

1<sup>a</sup> Kion ili manĝas. 2<sup>a</sup> Kion ili spiras. 3<sup>a</sup> Medio en kiu ili vivas.

La homo havas la eblecon ŝanĝi sian nutraron (nur la impresojn.)

LAŬ LA ORDINARA SCIENCO: La klasifo fariĝas laŭ la eksteraj trajtoj: ostoj, dentoj, funkcioj; mamuloj (klaso kaj speco), vertebruloj, ronguloj, ktp.

LAŬ LA EKZAKTA SCIENCO: La klasifo fariĝas laŭ la kosmaj trajtoj. 1-e Laŭ tio kion ĝi manĝas. 2-e Laŭ tio kion ĝi spiras. 3-e La medio en kiu ĝi vivas.

EKZEMPLE:	HOMO	FISO	ARBO
	↓	↓	↓
manĝas: →	H 768	H 1536(*)	H 1536
spiras: →	H 192	H 192	H 192 / H 96
vivas en: →	H 192	H 384	H 192/H 3072 (grundo)

(\*) Manĝaĵoj ne asimileblaj de homo.

La inteligento de materio determiniĝas de la kreaĵo al kiu ĝi povas taŭgi kiel manĝaĵo. Laŭ ĉi tiu vidpunkto, ĉio estas pli inteligenta, ĉu kuirita aŭ kruda terpomo? Kruda terpomo povas nutri porkojn, sed ne homojn, do, kuirita terpomo estas pli inteligenta ol kruda terpomo.

Por ĉia estaĵo, la kosma ordo determinas ĝian manĝaĵon, ĝian aeron kaj ĝian medion, nome, neniu vivanta estaĵo povas ŝanĝi sian manĝaĵon, kion ĝi spiras kaj la medion kie ĝi vivas.

Homo ne povas plibonigi sian manĝaĵon, nek kion li spiras; ekzemple: H 96 anstataŭ H 192 estus nespirebla gaso aŭ inkandeska gaso (fajro); kaj H 384 estas akvo; homo ne povas spiri fajron kaj manĝi akvon, sed li povas plibonigi siajn impresojn, kaj enkonduki tiel subtilajn Hidrogenojn en sian organismon.

Sur ĉi tio baziĝas la ebleco de lia evoluo. Anstataŭ nutri sin per H 48, li povas fari tion per H 24, 12, 6 kaj eĉ 3!

DIAGRAMO ŜTUPICITA DE ĈIUJ VIVANTAJ ESTAĴOJ  
(Vidu ĝin sur la sekva paĝo)


Laŭ ĉi tiu diagramo, ĉia kreaĵo, ĉiu grado de esto difiniĝas samtempe per tio kio al ĝi taŭgas kiel manĝaĵo, kaj per tio al kio ĝi taŭgas kiel manĝaĵo, nome, en la kosma ordo, ĉia kreaĵo nutras sin per determinita klaso de malsuperaj kreaĵoj, kaj ĝi mem taŭgas kiel nutraĵo al determinita klaso de superaj kreaĵoj.

Laŭ ĉi tiu diagramo la homo estas H 24, manĝas H 96 (anstataŭ 768, ĉar temas pri malsamaj skaloj!), kaj li mem estas manĝaĵo por H 6.

La elnomado de la Hidrogenoj estas farita laŭ la 3<sup>a</sup> gradigo de la Tabelo de Hidrogenoj; kvankam H 6144 ne troviĝas en ĝi!; ĉi tio ŝuldiĝas al tio ke ĝi temas pri


nekompleta H!, nome, H sen la Sankta Spirito (sen la 3<sup>a</sup> forto!), tio signifas ke ĝi apartenas ankaŭ al la 3<sup>a</sup> gradigo, sed ĝi restas sen realiĝi.

DIAGRAMO STUPIGITA DE ĈIUJ VIVANTAJ ESTAĴOJ



Ĉi tiu diagramo montras la rilaton inter ĉiuj estaĵoj.

3<sup>a</sup> GRADIGO (ĈIS H 3072) DE LA TABELO DE HIDROGENOJ POR LA STUDADO PRI LA HOMO.



Ĉiu kompleta Hidrogeno kombinita el: C O kaj N

Se ni prenas la lastan Hidrogenon de la 3<sup>a</sup> gradigo: H 3072, ĉi tiu H konsistas el C 512,0 1536 kaj N 1024.

Eĉ plue, La Nitrogeno transformiĝas en la Karbonon de la sekva triopo, sed por ĝi estas nek Oksigeno nek Nitrogeno. Do, per kondensiĝo ĝi mem fariĝas H 6144, sed ĝi estas mortinta H, sen iu ebleco transformiĝi en ion alian; ĝi estas H sen la Sankta Spirito, nome, sen la 3<sup>a</sup> forto konektiga!

\*\*\*\*\*

Pli ampleksa pritrakto de ĉi tiu temo troviĝas en la eseo titolita: "LA LEĜO DE RECIPROKA SUBTENADO DE ĈIO EKZISTANTA" (el: "FARANTE NOVAN MONDON", disvolvita de la Gurdiefa disĉiplo Johano G. BENETO), kiu sekvas post ĉi tiuj FRAGMENTOJ.

\*\*\*\*\*

EKZERCO DE ATENTO: "MI VOKAS MIN KAJ MEMORAS PRI MI"

En kunveno, apartiĝi en iu determinita momento de la ludo de l' konversado ("iMi vokas min, kaj memoras pri mi!") kaj observi la ceterajn, vidi kiel ili obeas al la enĉenigo de siaj ideoj, kiuj estas la esprimo de meĥanismoj naskitaj de la eduko, de la instinkto aŭ de la intereso.

Resume kompilis: ERGOTO DE BONAERO

\*\*\*\*\*

**DIGNE MORTI**, 10-paĝa resumo pri la stato en landoj, kie estas Asocio por Rajto Digne Morti (escepte Francion), de A.-M. DURLLEN'-ROLIER', estas havebla de Parizia SAT-Rondo, 67 av. Gambetta, F 75020 PARIZO.

Prezo: pli-malpli 10 FF laŭ pagokapabloj. La sendokostoj estas entenataj. Ĉeko je nomo SAT - pĉk 123422K PARIS. (Francianoj sendu rekte al la poŝtĉek-centro. Uzu la korespondan parton) aŭ per uzablaj poŝtmarkoj.

\*\*\*\*\*

Kelkaj vortoj de la red. Mi eklernis esperanton en 1954 dank'al amiko Rolando Leveaud. Samjare en novembro artikolo lia aperinta en "SAT-Amikaro" konvinkis min pri la valoro de SAT. Permesu al mi la laŭtularo, ke, memorige pri li, kiu tiom longe restis mia lumturo, **Laŭte** represu sur p. 58 kaj 59 tiun al mi tiel karan artikolon. C. Baudé

## Sur la vojo al internacia lingvo...

*Kiam oni (mi) kritikas E-on, tiam konvinkitoj vigle kaj eĉ kolere reagis kun argumentoj pli ideologiaj, kvazaŭ religiaj, ol, kiel estus pli logike, lingvaj... Tial mi faris testeton, kiu konsistas el hazarde ekstrakti frazon el internacia gazeto kaj ĝin traduki en plurajn mondkalajn konkurencajn lingvojn planitajn kaj etnajn, tial ke oni komparu iliajn kapablojn respondi al la postuloj de nuntempa internacia komunikado.*

En la usonangla:

A first salvo was fired Monday in what is likely to be a long battle to reduce the government's power over Japan's minutely regulated economy, as a commission appointed by the prime minister issued a list of 475 regulations that it said should be eased or eliminated.

En la franca:

Une première salve a été tirée lundi dans ce qui risque d'être une longue bataille pour réduire l'influence du gouvernement sur une économie japonaise minutieusement réglementée, lorsqu'une commission désignée par le premier ministre a rendu publique une liste de 475 réglementations devant être allégées ou supprimées.

En la hispana:

Una primera salva ha sido disparada lunes en lo que probablemente será una larga batalla para reducir la influencia del gobierno sobre una economía japonesa minuciosamente reglamentada, cuando una comisión nombrada por el primer ministro publicó una lista de 475 reglamentaciones a ser aligeradas o suprimidas.

En Interlingva:

Un prime salva ha essite tirate lundie in lo que risca esser un longe batalia pro reducir le influentia del governmento super un ekonomia japonese minutiosamente regulamante, quando un commission nominate per le prime ministro publicava un lista de 475 regulamations debende es ille esser alleviate o eliminate.

En Esperanto:

Unua salvo estis pafata lunde en tio, kio probable estos longdaŭra batalo por redukti la povon de la registaro sur detalege reglamentitan japanian ekonomion, kiam komisiono nomita de la ĉefministro publikigis liston de 475 laŭ ĝi malpezigendaj aŭ eliminendaj regularoj.

## SAT-ANO ?... KIAL ?

La ĉiutaga agado tiom premas nin sub siaj senĉesaj postuloj, ke ni malofte trovas la oportunon je tiu superrigardon por nin orienti, klare difini la celojn, kiuj kondiĉas tiun agadon. Ĉe multaj batalantoj, iom post iom kaptitaj de la dentrado de sinsekvaj praktikaj taskoj, tiuj celoj iĝas subkonsciaj, dronas en la nebulo de la rutino, fine konfuziĝas kun la rimedoj. Tial memekzameno de tempo al tempo nepre necesas : jen estas la ĉefa utilo de la datrevenoj.

Oni permesos al iu SAT-ano inter multaj aliaj kapti la okazon skizi tian bilancon, kun la espero ke, en tiuj personaj, neoficialaj perspektivoj, multaj k-doĵ rekonos familieran bildon, dum kelkaj novuloj pli klare konscios-pri la signifo de sia aliĝo al nia asocio.

Mi apartenas al la tuj postmilita esp-ista generacio. Mi unua-move venis al SAT, forte impresata de ĝia eksternacia pensmaniero. tiom reliefa en tiu periodo, k tiom alloga por sincera pacisto. Ni memoru la tiaman atmosferon : post ses jaroj da naŭziga milito, inundis nin tajdo da naciisma malamo. Ni estis la « venkintoj », niajn gazetojn plenigis bombastaj raportoj pri « heroaĵoj ». Pli abrupta ol iam staris la muro inter t.n. bonaj k malbonaj popoloj. Ĉiu Franco glutis « Germanaĉon » je ĉiu matenmanĝo. Dume, mi legis en « SAT-Amikaro » pri sennacieca helpservo por militkaptitoj k ĉiulandaj malsatantoj. Mi pensis : « Finfine! jen medio kie mi retrovas liberan spiriton, kiu staras super la kutimaj autauĵuĝoj, — kie mi povas malkaŝe esprimi miajn ideojn pri la sangaj de ĉiuj adorataj idoloj, sen aspekti kiel suspektinda, danĝera frenezulo! jen homoj kiuj ne okulumas al mia pasporto antaŭ ol fari al si opinion pri mi! »

Plie, mi konstatis, ke tiu sennacieca, sekve pacamanta sinteno ne restas abstrakta. Ĝi sin esprimas en la ĉiutaga vivo per varmkora frateco. Certe, mi ne estas sektema ĝis tiu pretendo, ke ni havas kvazaŭnan monopolon pri tiu virto. Sed, ĉu nova fervorulo povus fermi la okulojn, kiam oni donas al li la eblon helpi, per akrobata sendado de pakajoj, tiujn « fi »-Germanojn, dum la supre elvokita « Rejn-Danuba » furoro? kiam li spertas tiun realan interfratigon dum sia unua SAT-kongreso (Amsterdamo, 1948)? kiam oni flustras al li ke inter la kongresanoj troviĝas tri Germanoj nelege veturintaj, eĉ el soveta zono? Kiel li evitu paralelon kun la malamikeca akcepto de Berlinanoj en la neŭtrala kongreso de Berno? Tiu novulo dum pluraj semajnoj biciklis tra Nederlando, konaŭtigante kun neforgesebla, senlima gastamo; eble li pretus atribui tion nur al famkonata nederlanda eco : nu, apenaŭ rehejmiĝinta, li legas en gazeto akran plendon de nederlanda neŭtralulo kontraŭ junuloj ne ĉiam bone vestitaj, kiuj alvenas kun dorsosako dum burĝa akcepto, k tre ĝenas la mondumantan dommaston. Eble ekzistas tiaj sintruduloj, sed kiel ne konstati ke ĉiam el la sama flanko fontas la grumbloj?

Krom sennacieco, pacamo, vivpraktika frateco, mi trovis en la SAT-amaro unu el la plej bonaj lernejoj pri toleremo : tie kuŝas gravega edukfaktoro. Sed ja necesas tuj precizigi nian koncepton pri nocio konscie nebuligita de kelkaj, kiuj kutimas akuzi nin pri sektemo... Estas facile sin proklami tolerema, kiam oni lasas eĉ la pordo siajn plej personajn ideojn k vivcelojn, kiel kromveston laŭvole demeteblan. Tiel kaŝtrita, oni babilas pri neŭtralaj bagateloj, timzorge ignoranta la tiklajn problemojn, kiuj konsistigas la sukcon de la vivo. Kontraŭe, kion mi sopiris, tio estis asocio kie mi ne forgesus, sed daŭrigus la ĉiutagajn luktojn. Esp-o estus, ne kvazaŭ religio per si mem, sed armilo plia por la komuna batalo. En la ordinara vivo, mi estas sindikatisto, mi estas pacisto : tia mi volis resti en mia esp-ista konduto.

Nu, mi venis al SAT, ĉar ĝi kulturis la veran toleremon, t.e. kuraĝa, pozitiva, konkreta komparo inter diversaj ideoj malkaŝe eldiritaj. Fronte kontraŭ la realo, plene esti si mem, — k tamen kompreni ke la aliaj estas malsamaj, jen la bazo de tiu toleremo. Sed ĝi tiras sian valoron por agado el la fakto, ke ni restas forte ligitaj per komuna idealo, kune larĝa k klare difinita : la lukto por pli justa, senklasa sociordo, por homa liberigo, kontraŭ ĉiuj dogmoj aŭ formoj de ekspluato kiuj brutigas, fosiligas la homon. Interne de tiuj principoj, ni agnoskas la ekzistrajton de diversaj, sed sinceraj opinioj.

Tial mi preferas ne imagi situacion en medio kie mi rondirus de la lingvo al la lingvo, flankenlasinta miajn esencajn aspirojn, limigita al senkoloraj akcesoraj okupoj, senĉese admonita : « Atentu, ne parolu pri milito, vi ofendus la generalon!... Ne aludu pri la pastroj, via najbaro estas ekleziulo... Silentu pri la strikoj, nia honorprezidanto estas akcikolektanto... k.t.p. »

Cetere, ne mankas neŭtraluloj, kiuj suferas pro ia manko : stranga hazardo sendis al mi la saman tagon du gazetojn. En la unua, junulara organo, montriĝis nepreciza sed certa malkontento de junuloj, kiuj serĉas idealon k ne plu povas satigi per tro generalaj ŝablonoj. La alia, faka buŝteno, entenis alvokon al pli pozitiva kultura laboro : la aŭtoro substrekis la nesufiĉecon de nur poresperanta propagando ĉiam turniĝanta en la sama cirklo.

Tio montras al ni, ke ni estas sur la ĝusta vojo. La laboro ne mankas al ni. Sed ankaŭ ne la forto : forto trankvila de tiuj, kiuj ne strute iluziĝas pri baldaŭna venko super la malhelaj genioj subpremantaj la homon, — kiuj tamen pensas, ke tiu lukto plinoblighas ilian vivon.

Tiu bildo ja ne pretendas esti kompleta. Eble, tamen, ĝi sufiĉos por montri, ke tio unuigas nin, tio estas iu SAT-vivstilo, kiu ardigas la entuziasmon de la junuloj, k vartas la flamon en la koro de la aliaj.

R. LEVREAUD.

**BROŜUROJ DISPONEBLAJ ĈE SAT-BROŜURSERVO**  
 Adreso : Cercle amical esperantiste F-47470 BEAUVILLE  
 PĈk: 3371 74M Bordeaux, samadrese

Por mendo minimume 120-franka, la afranko estas inkluzivita.  
 Se malpli ol 120-franka, pagi la afrankon post ricevo de la fakturo.  
 Rabato al libroservoj se la mendo superas 120 FF : 20 %.

Mendkodo. Titoloj (Aŭtoroj)	Prezo en FF
Aa. La antaŭvenantoj de Anarkiismo (Armand)	4
AA. La Aperoĵoj de Ahasvero (Han Riner)	30
AL. Alvokoj al la homa konscienco (APJR)	10
AN. Nia angorplena socio (Milan Ŝimeĉka)	3
AP. Amo per proverboj (Azevedo)	2
AT. Kial mi estas ateisto (A.Lorulot, tr. Valo)	30
AU. Al unu lingvo por Eŭropo? (Fettes)	5
BA. Bazoj de Anarkiismo (Balkanski)	25
BP. Legendo pri la bela Pekopeno (V.Hugo)	15
CM. Civila Malobeemo (H.D.Thoreau)	10
ĈS. Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio? (Lanti)	8
DI. Kiel diri...? (Lentaigne), E-frazeologio	30
EL. Elekto de tekstoj de Bakunin	10
ES. Por ekologia socio (Murray Bookchin)	15
ET. Etiko I (Kropotkin)	15
EV. Eduko kaj vivsignifo (Krishnamurti)	7
FA. Konstrui fajron (Jack London) novelo	5
FE. Esprimaro Franca-Esperanta (Bourgeois)	50
FF. La Forto de la Fortaj (Jack London)	5
FI. Laŭ la fluo de l'interparolo (Bourgeois) Esp./Fr.	10
FP. Faux amis. Faux parents et "étrangers"	15
FV. Fronte al la vivo k.a. tekstoj (Krishnamurti)	10
FZ. Filozofio Zoologia (Lamark)	25
GE. Abrégé pratique Grammaire & Esp. (Lentaigne)	15
HO. La Evangelio de la Horo (Berthelot) eld. "Fonto"	10
IE. Initiation à l'Esperanto (An Kaŭ)	5
IK. Instrui E-on por komuniki (C.Samain)Didaktiko	5
IN. Individualisma socialismo de A.R.Protschowsky	2
JA. Jaro 2000 (H.Muller) disdona ekonomio	35
KA. Kancero kaj Ekologio (Maurice Touchais)	15
KB. Kie brulas, ĝentlemanoj? (poemaro) Buchowski	20
KE. La Kvina Evangelio (Han Riner)	25
KI. El la kara infaneco... (Valo)	20
KP. Katastrofplano pri Fessenheim-atomcentralo	5
KV. Kvardek paŝetoj al plua posedo (Lentaigne)	10
LA. Lingvaj anguloj (Baronnet)	25
LEK. La eta kato kiu ne volis morti (por infanoj)	5

LK. La Konflikto (Le Dantek) + Dubi (Alain) tr.Lanti	25
LL. Leteroj de Lanti (ĝis 1937)	50
LM. La Mondo ne havas atendejon (Dekker)	20
LN. Linguistique et non-violence (H.Masson)	3
LR. La Ribelo (Joseph Roth) romano	20
ME. La Mistero de nia surtera vivo (Archdeacon)	5
MM. Migrante tra Metioj (Valo) aŭtobiografio	25
MN. Ĉu militista defendo estas kredebla? (Lasserre)	6
MS. Memvola Servuto (La Boétie)	5
MV. Mia vivo. Artikolaro. Poemaro (Bartelmes)	15
NA. Naciecaj problemoj (Roza Luksemburg)	10
NC. Naciismo (Lanti)	12
NI. Nia Individuismo (E. Armand)	6
NL. Naturleĝo, pensoleĝo, morala leĝo (Leo Polak)	3
NO. Nova Paradigmo en Psikologio (Feldman)	35
NT. Ne tiel, sed tiel ĉi! (Faulhaber)	15
PA. Pensoj de PASKALO (ekstraktoj)	20
PC. Parabolo pri la cisterno (Bellamy)	5
PF. Proverbaro Franca/Esp. (Bourgeois)	20
PL. Esperanto kaj Literaturo (R.Laval)	5
PR. La Poemo de Rodano (Frederi Mistral)	30
RK. Rakontoj I (Kafka)	15
PS. Psikotransformismo (Ergoto de Bonaero)	5
RO. Rompoj (A.Jacquard)	5
SK. Kio estas Socikredito ?	3
SR. Les 16 règles commentées (R.Laval)	3
SS. Sindikatismo. Sovetoj (A.Pannekoek)	5
ŜG. La Ŝtona Gasto (Michel Duc Goninaz) (teatraĵo)	5
TC. Por tutmonda civitismo (A.Gaynard-Rollet)	20
TM. Tra la mondo per biciklo kaj esp. (Péraire)	25
TP. La Turo de l' Popoloj (Han Riner) romano	30
UN. Unu aŭ Nul (Guy Marchand) Mondcivitismo	30
US. Unueco super prokreda dividiĝo (Leo Polak)	3
VH. Ĉu ni vere helpas la trian mondon? (Roberts)	15
VL1. El Verkoj de Lanti 1. (For la neŭtralismon! Laborista esperantismo - Absolutismo - Herezulo - Herezaĵo - Adamaĵoj)	40
VL3. El Verkoj de Lanti 3. (de 1937 ĝis 1946)	30
VO. Vortoj de Kamarado E. Lanti	20
VT. El verkoj de Leo Tolstoj	10
ZH. La Zamenhofa Homaranismo (A. Caubel)	5

**CERCLE AMICAL ESPERANTISTE  
(AMIKA ESPERANTO-RONDO)**

FR-47470 BEAUVILLE  
poŝtkonto : 3371 74 M Bordeaux


kultura asocio laŭ la franca leĝo  
de 1901 kun membraro diversnacia  
proponas jenajn servojn :



dumonata kultura informilo  
kaj esprimilo internacia  
(legantoj en pli ol 30 landoj)  
kun ties adresaro ĝisdatigata



eldonado de diversaj  
manuskriptoj, literaturajoj  
kaj lernmaterialo  
(jam pli ol 170 titoloj eldonitaj)



Renkontiĝejo "Moulin de Beauville"  
(ELDONEJO, BIBLIOTEKO, RESTADO)

**ABONILO / MENDILO**

sendota al

Cercle amical espérantiste  
F-47470 BEAUVILLE

Mia adreso :

Mi subtenas la asocion per membriĝo  
kaj partopreno en la decidoj.  
Jara kotizo : ekde 20 FF. →

Mi abonas al Laŭte!

\* por unu jaro (Eŭropo : 60 FF)  
(Ekstereŭrope : 80 FF) →

\* por pluraj jaroj per almenaŭ  
200 FF (Mi ricevos krome  
la novajn broŝurojn ekde nun) →

Mi donacas abonon  
al nepagipova amiko (40 FF) →  
Adreso :

Mi mendas jenajn broŝurojn  
(Sufiĉas la mendkodo.  
Eventuale uzu la dorsflankon)

Kiam la mendo atingas 120 FF,  
libroservo kaj monprovizantoj A aŭ B  
rajtas 20%-rabaton kaj ne pagas  
la afrankon.

Alies mendoj :

Se malpli ol 120 FF,  
aldoni 20% por la afranko

Mia mendo sumas  
(post eventuala rabato aŭ aldono) →

SUMO : →

Mi pagas per poŝtĝiro/bankĉeko/monbiletoj/respondkuponoj  
neuzitaj francaj poŝtmarkoj/per mia monprovizo A/B •  
Alia rimedo :  
Dato kaj subskribo :



- la venonta numero aperos fine de januaro -

Jen la sezono de la reabonoj... Malsupre de tiu ĉi paĝo vi ekscios pri via situacio. Se vi havas konton ĉe Laŭte/Broŝurservo kun sufiĉa monprovizo, via reabono okazos aŭtomate per elpreno de 60 FF (aŭ 80 por ekstereŭropanoj) el via konto. Se ne, prefere ĝiru la abonprezon rekte al nia poŝtkonto. En kelkaj landoj estas oportune sin turni al la

## PERANTOJ

- Aŭstralio** : Vlado KOSEF, 58 Green St., COBAR, NSW 2835 (20 aŭs.\$)
- Brazilo** : G. LEDON, Rua Maria Aparecida Anacleto 111, 04809 SAO PAULO  
aŭ : Brazila Esperanto-Ligo, C.P. 03625, 70084-970 Brasilia-DF (80 FF)
- Britio** : Edward OCKEY, Longvida, 15 Upper Pines, Woodmansterne,  
BANSTEAD, SM7 3PU (6 pundoj)
- Bulgario** : Ganĉo DAMJANOV, Makariopolski 7, 6100 KAZANLAK (40 FF)
- Germanio** : la SAT-peranto, aŭ Manfred FUHRER, Am Stadtpfad 11,  
65760 ESCHBORN. Pagi al : Libera Esperanto-Asocio, Sonderkonto  
Bücherdienst. Poŝtĝiro Karlsruhe 2125 01-759, BLZ 660 100 75 (20 DM)
- Ĉeĥio** : Antonio RIBAS, Svojsikova 752, 473 01 NOVY BOR (120 kr)
- Japanio** : MINE Yositaka, Kitahama-kitawaki 29-16, TAKASAGO-si  
Hyōgo-ken, 671 01 (2000 enoj)
- Pollando** : Leszek DOBROWOLSKI, str. Sowia 1/10, 59-300 LUBIN(30000 zł.)
- Rusio** : Vladimír MININ, ab.ja 2000, 634063 TOMSK (laŭ interkonsento)  
aŭ : Georgij TUJAKIN, 33A-114, Kornejĉukstrato, 127543 MOSKVO
- Svedio** : Pelle PERSSON, Svartviksvägen 14, 123 52 FARSTA (70 kr.)
- Usono** : ELNA, P.O.Box 1129, EL CERRITO, CA 94530 (20 US \$)

**Nia centra poŝtkonto** : 3371 74 M BORDEAUX je nomo de :  
CERCLE AMICAL ESPERANTISTE (mencii same sur bankĉekoj!)

**Ĝenerale peras** : SAT, 67 av. Gambetta, FR-75020 PARIS

**kaj** : UEA-sidejo en konto "ljb-b". Indiku : "abono al Laŭte"

Via abono al Laŭte! estas **finita** / ~~registrita por 1994.~~

En via konto ĉe Laŭte!/SAT-Broŝurservo **restas** : 38,20  
**mankas** :

\*\*\*\*\* \* \* \* \* \*\*\*\*\* \* \*\*\*\*\* \* \*\*\*\*\* \* \* \* \* \* \*\*\*\*\* \* \* \* \* \* \*\*\*\*\* \* \* \* \* \*